
1984 oktobro
77a jaro
n-ro 946 (10)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Ekstera agado: Partopreni kaj ne nur ĉeesti

Vi trovos

kelkajn tekstojn pri kunsidoj dum la Kongreso en Vankuvero en ĉi tiu numero de la revuo. En tiuj raportoj, same kiel en kelkaj aliaj, troviĝas tuta aro da instigoj – kaj ekzemploj – kiel efike labori por la disvastigo de Esperanto. Kiam ni en ĉi tiu revuo rakontas al vi, kion oni faras en Aŭstralio (p. 161) aŭ Belgio (p. 165), ni faras tion ne por provizi vin per dolĉa dormiga legaĵo, sed por veki vin kaj sproni al utila laboro por la Internacia Lingvo. Se vi ial mem ne povas aktivi, ĉiam restas la ebleco apogi tiujn, kiuj povas kaj volas labori.

Enhavo

161 Eksteraj rilatoj: Tridek jaroj post Montevideo (Ralph Harry)
162 Komuna kongreso de la brazila movado rikoltis laŭdojn
163 Esploro kaj dokumentado: Tri konferencoj en preparo
Tago de la lernejo: Utila forumo por la instruistoj
164 Sennacieca Asocio Tutmonda: Diskutoj pri paco kaj la Tria Mondo (Bert de Wit)
165 Aplika lingvistiko kaj internacia kompreniĝo
166 Faka agado: La 18a Internacia Konferenco de ILEI
Eldonejoj: UEA transprenas la stokojn de TK/Stafeto
167 Reagoj: Pri la loko de *Kiuj semas plorante...* (É. Tófalvi, O. Kníchal); Inaŭguru Esperante kun samtempa interpretado (S. Maul); Klarigo pri nia unua afrika vortaro (J. Knappert); Komputotekniko por blinduloj (R. Schnell)
168 Belartaj Konkursoj 1984: Fumo (Mauro Nervi); Kalendaro
169 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 70a Universala Kongreso)
170 Enketo pri la 69a UK: Favora reago (D. Masterman)
171 Recenzoj: *Faktoj kaj fantazioj* de Marjorie Boulton (B. Ragnarsson); *Ĉu vi konas la Teron?* de Endre Dudich (J.M. Mabesoone); *La kunikloj de mia avo* de G. Sarandrea/L. Gabrielli (K. Trimborn); *Mediteme* de O. Kníchal (K. Schubert); *Etulaj aventuroj* de Zora Heide (E.V. Tvarožek); *La retoromanĉa* de Artur Baur (H. Chapman); *Materada* de F. Tomizza/P.G. Soranzo (J.F. Cool); *Hungaraj fabeloj* de E. Benedek/M. Benczik (E. Formaggio); *De patronia al Ŝekspir* de L.L. Zamenhof (R. Schulz)
176 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
178 Loke – Fake (mallongaj novaĵoj)
179 UEA-kotizoj por 1985: Por mem rekotizi kaj varbi aliajn
180 Nekrologoj; Oficiala informilo de la CO de UEA; Anoncetoj

La kovrilo

montras parton de la partoprenantoj en la 7a Monda Kongreso pri Aplika Lingvistiko, komence de aŭgusto en Bruselo. Pluraj esperantistoj ne nur ĉeestis tiun kongreson, sed ili ankaŭ aktive partoprenis en ĝiaj laboroj. Tia faka agado devus esti la ĝusta kaj pli efika ol simpla interŝanĝado de saluttelegramoj kun gravaj ekstermovadaj kunvenoj, kiuj koncernas ankaŭ nian laborkampon. Iasence la raporto pri la kongreso en Bruselo (vidu la paĝon 165) konkretigas la ideojn por kiuj pledas R. Harry sur la apuda paĝo. Vi vidas sur la kovrilo ankaŭ la prezidanton de la Asocio Internacia pri Aplika Lingvistiko, profesoron Nivette el Bruselo, kiu donis gravan apogon al la prezentiĝo de Esperanto en la 7a Monda Kongreso pri Aplika Lingvistiko.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US $ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, 's Gravendijkwal 108, 3014 EJ Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00036 Palestrina, Italio.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 3 rue Alphonse Daudet, F-75014 Paris, Francio; ☎ (1) 540 90 32.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 946 (10), oktober 1984. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Tridek jaroj post Montevideo

Inter la multaj kunsidoj, kiuj okazis en la kadro de la 69a Universala Kongreso en Vankuvero, estis ankaŭ tiu pri la agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉe Unesko. La ĉefa temo de tiu kunsido estis "Tridek jaroj post Montevideo", ĉar en decembro ĉi-jare estos precize tridek jaroj post du gravaj eventoj de 1954 en Montevideo, kie la Ĝenerala Konferenco de Unesko aprobis la konsultajn rilatojn kun UEA (la 8an de decembro) kaj la konatan rezolucion favore al Esperanto (la 10an de decembro). Pri la nuna agado en Novjorko kaj Parizo parolis la estraranoj Despiney kaj Tonkin. Ralph Harry, antaŭa ambasadoro de Aŭstralio ĉe Unuiĝintaj Nacioj, faris en tiu kunsido gravan paroladon, kiun ni plejparte transprenas ĉi-sube, ĉar ni kredas, ke la ekzemplo de Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la maniero en kiu ĝi ankoraŭ utiligas la rezultojn de Montevideo povas servi kiel vojmontrilo ankaŭ por aliaj landaj asocioj.

Antaŭ tridek jaroj, en sia Ĝenerala Konferenco en Montevideo, Unesko agnoskis la valoron de Esperanto. Multaj esperantistoj en diversaj landoj kontribuis al la atingo de tiu rezolucio, sed la ĉefa estis prof. d-ro Ivo Lapenna. Postaj okazaĵoj ne malpliigis la gravon de tiu sukceso. Ĝi estas la bazo kaj fundamento de nia kunlaborado kun Unesko, de la librosekcio Oriento-Okcidento, de la Esperantaj eldonaĵoj de Unesko pri homaj rajtoj, de la broŝuroj pri edukado por kaj pri Unesko mem. Gratulindaj estas la fideluloj, kiuj daŭrigis la aferon ĉe la sekretariato de Unesko en Parizo.



Rejkjaviko estis rekonfirmo de Montevideo: Amadou-Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de Unesko (meze) en la Inaŭguro de la 62a Universala Kongreso en 1977

En sia artikolo en *Esperanto* de majo ĉi-jare, Humphrey Tonkin priskribas la krizon, kiu rezultiĝis el la decido de Usono retiriĝi el la organizaĵo. Li konkludas, ke Unesko travivos la nunan krizon. Sed la krizo estas tre komplika kaj ĝi entenas kelkajn lecionojn por UEA. Temas ne nur pri divido de riĉaĵoj kaj povo. Ĝi ne estas ripeto de la debatoj pri la Nova Ekonomia Ordo. La usona registaro kredas, ke ĝi devas rezisti tendencon, kiu kondukus al administrado de novaĵ-kolektado kaj -dissendado fare de la ŝtato. Ĝi kredas, ke sub la preteksto protekti ĵurnalistojn oni povus regadi ilin. Pli ol unu ŝtato kredas, ke Unesko fariĝis tro "politikema": ke ĝi devas uzi siajn limigitajn financajn rimedojn ne por kritiki agadon de iuj ŝtatoj, sed por malpliigi analfabetecon, ne por rezolucii pri malarmado, sed por intensigi la interŝanĝadon de kulturaj valoroj. Kaj ĝi opinias, ke la usonanoj, kies impostoj pagas kvaronon de la buĝeto de Unesko, havas la rajton plendi, se tro granda proporcio de la elspezoj estas por la salajroj de altrangaj oficistoj kaj ties vojaĝado. Ĉiu internacia organizaĵo devas agi – kaj videble agi – modeste.

Eĉ sen la nuna krizo, estas limoj al la konkretaj rezultoj, kiujn niaj reprezentantoj povas atingi en Parizo, se la landaj asocioj ne klopodas ĉiu en sia ĉefurbo. Laŭ la sperto de Aŭstralia Esperanto-Asocio estas pluraj metodoj, kiujn landaj asocioj povas uzi por helpi akiri rekonon de Esperanto kaj uzadon de Esperanto en Unesko. Kaj tiu agado povas ebligi efikan laboron, per alianco kun aliaj neregistaraj organizaĵoj, en la koncerna lando mem.

Partopreno en konsultadoj

Ĉiu landa asocio devus havi rilatojn kun la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj. Unua utila paŝo estas atentigi la ministerion kaj ĉefan oficiston de la koncerna departemento, ke – sekve de la decido de Unesko – UEA havas konsultajn rilatojn kun tiu organizaĵo, ke la landa asocio estas aliĝinta al UEA kaj, ke la asocio pretas servi al la departemento kaj doni sian kompetentan opinion pri koncernaj lingvaj aferoj. De tempo al tempo oni informu la ministron kaj la departementon pri elstaraj eventoj en la Esperanto-movado. Oni proponu, ke la landa asocio estu inter la organizaĵoj, kiujn la Nacia Komisiono por Unesko konsultu pri la programo de Unesko.

La landa asocio devas akiri, ekzemple ĉe la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj aŭ ĉe alia respondeca

ministerio (eble tiu pri edukado, scienco aŭ kulturo) informmaterialon pri la Nacia Komisiono por Unesko. Oni nepre notu, kiuj estas la prezidanto, sekretario kaj unu-du aliaj gvidaj membroj. Poste oni povos informi ankaŭ la komisionon, ke la landa asocio deziras esti konsultata pri la programo de Unesko. Oni invitu la prezidanton esti patrono por la Jubilea Jaro de Esperanto. Oni ankaŭ regule invitu membrojn de la komisiono observi la nacian kongreson (kaj la Universalan Kongreson, se ĝi okazas en la koncerna lando).

En Aŭstralio, kaj supozeble ankaŭ en aliaj landoj, la registaro pere de la komisiono invitas taŭgajn neregistarajn organizaĵojn partopreni en konsultadoj. Ankaŭ la komisiono partoprenas. Oni informas la neregistarajn organizaĵojn pri la laboro de Unesko, pri la buĝeto, pri planoj. Oni petas la neregistarajn organizaĵojn esprimi sian vidpunkton kaj proponi ideojn.

La reprezentantoj de la Esperanto-asocio kompreneble ne tro parolas, sed ili parolas kiel spertuloj pri la tutmonda lingvo-problemo, pri la valoro de Esperanto por kulturaj kaj sciencaj interŝanĝoj, pri la kunlaborado de UEA kun Unesko, pri la kosto de interpretado kaj tradukado en Unesko. Ili havas ideojn, kiel ekzemple: Unesko eldonu sian revuon "Kuriero" en Esperanto, ĝi eldonu ankaŭ pli da bazaj dokumentoj pri edukado por paco. Oni ne konstante postulu, ke la registaroj enkonduku Esperanton en la lernejojn, sed oni kviete kaj trankvile asertu, ke tio devas okazi, ĉar la mondo bezonas komunan lingvon.

Dum aŭ post la konsulta kunveno oni nepre sendu al la komisiono, al la koncernaj ministerioj (inkluzive al la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj) la proponojn de la landa asocio en mallonga sed sufiĉe ampleksa dokumento.

En Aŭstralio, ekzemple, ni rekomendis, ke la aŭstralia ambasadoro ĉe Unesko proponu, ke la Centjara Jubileo de Esperanto estu listigita (same kiel estis la Centjara Jubileo de Zamenhof) en la kalendaro de venontaj eventoj de tutmonda signifo, eldonata de Unesko.

Post la konsultado de la komisiono ni kutime sendas al la ambasadoro de Aŭstralio en Parizo oficialan leteron kun kopio de la dokumento, kiun ni sendis al la registaro, por "averti" lin, ke li ricevos instrukciojn, kaj por peti lian helpon. Kompreneble, se iu esperantisto persone konas la ambasadoron aŭ iun stabanon, estas utile skribi ankaŭ persone.

Rilatoj kun aliaj neregistaraj organizaĵoj

En 1982, dum konsultado kun la Komisiono por Unesko ni konatiĝis kun kelkaj organizaĵoj, kiuj montris intereson pri Esperanto. Artikoloj pri la kunlaboro kun tiuj organizaĵoj kaj ĝiaj sekvoj aperis en la pasintjaraj julia-aŭgusta kaj novembra numeroj de *Esperanto*. Kroma efiko de la agado estis, ke preskaŭ ĉiuj kunlaborantaj organizaĵoj, kun entute 30 000 membroj, raportis pri Esperanto kun la teksto de la rezolucio de la konsultado en siaj organoj.

Esperantistoj povas esti anoj ankaŭ de aliaj bonfaraj organizaĵoj. Kaj nia agado en Aŭstralio pruvas, ke la landaj asocioj povas utiligi tion, por oficiale akiri la subtenon de tiuj organizaĵoj en nia kampanjo por la Internacia Lingvo.

Ralph Harry

Komuna kongreso de la brazila movado rikoltis laŭdojn

De la 12a ĝis la 15a de julio 446 personoj – laŭdire rekorda nombro – partoprenis la 20an Brazilan Kongreson de Esperanto en Campinas en la ŝtato San-Paŭlo. Ili venis el 14 federaciaj ŝtatoj de la lando, el Argentino kaj Urugvajo.

Ĝi estis la unua komuna kongreso de la tri landaj asocioj de Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto.

Oni aparte laŭdis la bonan organizon de la kongreso, kies programo prezentis admirindan gamon de allogaĵoj: rondoj por komencantoj (gvidataj de Sylla Chaves kaj Victor Sadler), fakaj kunvenoj de UEA-delegitoj, de instruistoj, artistoj, vegetaranoj, filozofoj, oomotanoj, katolikoj k.a. Akademiano Geraldo Mattos respondis dum horo al lingvaj demandoj kaj poste prelegis pri "Lingvistika priskribo de la verbo en Esperanto". Aliaj fakaj prelegoj estis "Duon-aŭtomata traduko pere de Esperanto" de Victor Sadler, "Radio-izotopoj aplikataj en nuklea medicino" de Geraldo Martins Coelho, "Kiel eviti dentan karion" de Roberto Resende kaj "Homeopatio kaj psikologio" de Carlos Lima Melo. Krome okazis aliaj prelegoj, arta vespero, aŭkcio kaj diversaj laborkunsidoj i.a. pri eldonado kaj kompilado de vortaroj. Oni ankaŭ inaŭguris monumenton al Zamenhof.

La salutinda kongrestemo "Integriĝo de la brazila Esperanto-movado" kondukis al unuanima rezolucio, kiu rekomendis pristudi pliajn paŝojn tiudirekte: enkondukon de komuna kotizo, eldonon de komuna gazeto ks. Jam estas decidite, ke la komunaj kongresoj fariĝu ĉiujaraj. La venonta okazos en 1985 en Belo Horizonte.

Tri konferencoj en preparo

Plenŝtopita tagordo kaj novaj iniciatoj karakterizis la laboron de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), kiu kunsidis en Vankuvero. En 1983 komencis aperi denove *Informilo por interlingvistoj*, kiu donas aktualajn informojn pri konferencoj, eldonaĵoj kaj esploroj en interlingvistiko, kaj kiun la Centro liveras senpage al aktivaj interlingvistoj. Tiu *Informilo* aperas sub redakto de Ryszard Rokicki (Pollando), kiu en Vankuvero estis nomita estrarano de CED. Samtempe CED starigis kontrakton pri kunlaboro kun Akademia Centro Interlingvistika en Varsovio (ĉe kiu laboras Rokicki).



CED volas konstantigi siajn sciencajn kunvenojn en Novjorko: Partoprenantoj de la konferenco en 1983

La revuo *LPLP* multe okupis la atenton dum la kunsido. Lastatempe anoncis sian eksiĝon el la redaktoreco de *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado* d-ro Richard Wood, kiu jam de multaj jaroj gvidas la revuon. Gvidantoj de CED en Vankuvero do dediĉis atenton al elekto de lia posteulo kaj ankaŭ al paŝoj por redukti la altiĝantajn kostojn, altigi la abonnombron kaj iagrade ŝanĝi la direkton de la revuo por koncentrigi ĝin je internaciaj lingvaj demandoj. La demando pri redaktoro restas ankoraŭ nesolvita.

Aliflanke, rapide antaŭeniras preparlaboro por tri konferencoj de CED. La tria "jarkonferenco" de CED okazos en Novjorko la 14an de decembro ĉijare kun temo "Lingvo-planado je internacia nivelo." La kvara estas antaŭvidata por decembro 1985 kaj enkadriĝos en la serion de sciencaj konferencoj prepare al la Jubilea Jaro. Temos verŝajne pri dutaga konferenco pri "La ideo de universala lingvo." Dum la Universala Kongreso en Aŭgsburgo en 1985 okazos la 8a Esperantologia Konferenco, kies programo esploros lingvajn aspektojn de la kongresa temo, "Antikvo kaj moderno: kion ŝanĝi, kion konservi?".

Tuj antaŭ la Kongreso aperis ampleksa 160-paĝa raporto pri la dua konferenco de CED (Novjorko, decembro 1983), kun ĉiuj referaĵoj, plejparte en la angla lingvo, prezentitaj en la konferenco, kies temo estis "Lingva konduto en internaciaj organizoj". La raporto estas vendata ĉe la Libroservo de UEA (24,00 guldenoj).

Utila forumo por la instruistoj

En Vankuvero okazis, triafoje en Universala Kongreso, Tago de la Lernejo. Pro foresto de la estrarano pri kulturo kaj edukado, Baldur Ragnarsson, prezidis la aranĝon d-ro Duncan Charters (Usono). Ragnarsson salutis la partoprenantojn de la Tago per letero, en kiu li emfazis, ke la konkretan disvastigon de Esperanto povas garantii nur la instruado de la lingvo mem kaj provizado de eblecoj uzi ĝin en la praktiko. La temo de la Tago estis "La edukado de Esperanto-instruistoj kaj kursgvidantoj".

Inter la prelegoj de la Tago estis "Lernejaj eksperimentoj koncerne Esperanton" de Günter Lobin (FR Germanio), en kiu li prezentis verŝajne ĉiujn ĝisnunajn lern-eksperimentojn kaj provis respondi al la demando, ĉu ili jam konfirmis la pedagogian valoron de la Internacia Lingvo. Helmar Frank (FR Germanio) prelegis pri la propedeŭtika valoro de Esperanto. Duncan Charters elmontris sistemon, per kiu taksi la kapablon de lingvo-lernanto, poste intervjuis komencanton kaj taksis lian kapablon laŭ la skalo de la sistemo. Eble estis implicite, ke eventualaj sciencaj studoj povus utiligi la skalon por montri kiel rapide kaj bone eblas lerni Esperanton kompare kun etnaj lingvoj. Charters poste montris propre registritan vidbendon, en kiu prezentiĝis diversaj instrumetodoj.

S-ino Irena Szanser (Pollando) prelegis pri la edukado de kursgvidantoj. Ŝi en Pollando kunordigas tian programon. Ŝi asertis, ke la "mito pri facileco" malhelpas al plena rego de la lingvo, ĉar ĝi kaŭzas subtaksadon de la rolo de la instruisto. Ŝi kritikis ankaŭ la kvaliton de nunaj lernolibroj kaj proponis, ke pluraj instruistoj kunlaboru en preparado de lernolibro, sed ili scipovu pliajn lingvojn ol Esperanton

kaj la gepatran. La proponita lernolibro devus montri la lingvo-sistemon, esti travidebla kaj sintezebla, veki intereson kaj doni instigon al la lernantoj, montri lingvajn universalaĵojn kaj enkonduki al tuja parolo kiel ankaŭ al ekkono de la Esperanta kulturo. Sekvis diversaj konsiloj pri la instruado mem, laŭ kiuj la instruanto devus eviti malfruan enkondukon de gravaj gramatikaj eroj, esplori la interferon inter la gepatra kaj Internacia, internaciigi la parolon, ekzercigi la lernantojn per kreaj taskoj (kiuj donas aktivan kapablon kaj ne nur pasivan scion) kaj konduki la lernantojn al plua studado.

La tago finiĝis per ĝenerala diskuto, kiun gvidis Duncan Charters, s-ino Wilma Eichholz (Kanado) kaj Marin Bacev (Bulgario). Leviĝis i.a. la temoj de la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de eksterlandaj Esperanto-instruantoj, la graveco de kompetenteco ĉe la instruanto, la grado de internacieco en lernolibroj de Esperanto, la bulgara sistemo de Esperanto-instruado lige kun la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica kaj la pedagogiaj verkoj de Bacev.

Ankaŭ en Vankuvero, kie tamen ĉeestis multaj instruistoj, estis klare, ke necesas daŭrigi la okazigon de ĉi tiu kongresa aranĝo, ĉar ĝi altiras multajn kongresanojn kaj firmiĝas kiel utila ĉiujara revuado de la aktualaj demandoj sur la kampo de la instruado de Esperanto.

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Diskutoj pri paco kaj la Tria Mondo

La 57a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazis de la 1-a ĝis la 8a de aŭgusto en Artigues, apud la okcident-franca urbo Bordozo. Aliĝis 260 personoj el 20 landoj. La materialaj kondiĉoj por bona kongreso en tiu regiono ne mankis – mankis nur sufiĉe granda salono por la kongreskunsidoj. Tiun problemon la Organiza Kongresa Komitato lerte solvis per granda tendo sur la tereno, kvankam necesis atenti la klapseĝojn. Antaŭ jaro ankoraŭ ne estis konate, ĉu SAT kongresos en Francio aŭ ne, sed malgraŭ la mallonga prepartempo oni sukcesis bone organizi la tuton.

Inter la kutimaj ĉeestantoj de la SAT-kongresoj estis sufiĉe da novuloj, plejparte gejunuloj, kiuj donis al la etoso apartan karakteron. Tio evidentiĝis ĉefe ekster la oficialaj kunsidoj, en kiuj oni traktis la raportojn, ĉar la gejunulojn pli interesas la debatoj pri aktualaj temoj aŭ kiel vivigi revuon kaj akiri kontribuojn de legantoj.


En la kongresdosiero troviĝis tre bona broŝuro de Glyn Roberts, *Ĉu ni vere helpas la Trian Mondon?* Oni montris ankaŭ filmon pri la brita help-agado "Iloj por Tanzanio". Tamen la kongresanoj verŝajne nur post la kongreso legis tiun broŝuron, kaj pro tio la debato pri la filmo kaj pri kiel helpi la Trian Mondon ne tiel sukcesis.

Alia interesa afero en ĉiuj kongresoj de SAT estas la Forumo, en kiu oni informas pri la situacio en la gastiganta lando. Do la situacio en Francio laŭ politika, ekonomia kaj socia vidpunktoj estis funde traktita. En varmega vetero oni cetere diskutis ankaŭ pri la pacmovadoj en nuntempa Eŭropo, kaj aprobis la ideon de komuna eldonaĵo tiutema kun Mondpaca Esperantista Movado. Kelkaj opiniis, ke SAT formulu klaran vidpunkton pri la atomarmado kaj ne estu nura peranto de ideoj el diversaj okcidentaj landoj. En la gvidrezolucio de la kongreso oni esprimis subtenon al la sendependaj pacmovadoj kaj kondamnon de rasismaj kaj faŝismaj tendencoj en nunaj socioj.

La prezidanto de la Plenum-Komitato en sia mesaĝo al la kongreso emfazis, ke SAT troviĝas en transira periodo. Kaj en la kongreso mem oni povis konstati tendencojn al modernigo. Tiel, oni ĉiutage informis la kongresanojn pri la kongres-okazaĵoj per filmita raporto, tre lerte prizorgita de Jacques Paul.

En laborkunveno oni esprimis deziron eldoni suplementon de *Plena ilustrita vortaro*, en kiu troviĝu modernaj vortoj pri novaj instrumentoj kaj ideoj. Tian eldonon oni povus realigi por la Jubilea Jaro.

Dum la kongreso Junulfako de SAT aktivis ne nur per kunsidoj, sed ankaŭ per vendado de kongresfotoj kaj balonoj, kiujn oni liberigis okaze de inaŭguro de Esperanto-strato en la urbo Lormont. Apartan renkontiĝon de gejunuloj en Villandraut, antaŭ la kongreso, partoprenis proksimume 40 homoj el sep landoj, kies libertempa karaktero lasis agrablajn memorojn. Debatoj pri "Kial vi esperantistiĝis?", pacismo kaj etnismo (kun kontribuo de Uwe Joachim Moritz,



Revigliĝo de la junulara fako de SAT: Diskutgrupo en Villandraut

redaktoro de la bulteno *Etnismo*) alternis kun biciklo- kaj kanu-ekskursoj. La venontjara renkontiĝo de Junulfako de SAT verŝajne okazos en Nederlando. Tie okazos ankaŭ la SAT-kongreso mem, kiu temos pri laboro kaj senlaboreco.

Kvankam en la SAT-kongreso ne prezentiĝis teatraĵo en Esperanto, oni montris filmon de Chaplin kun Esperanta parolo. Raportis pri la kongreso kelkaj ĵurnaloj kaj loka radiostacio.

Bert de Wit

7a MONDA KONGRESO PRI APLIKA LINGVISTIKO

Aplika lingvistiko kaj internacia kompreniĝo

De la 5a ĝis la 10a de aŭgusto Internacia Asocio pri Aplika Lingvistiko (AILA) okazigis sian sepan mondkongreson en la nederlandlingva Libera Universitato de Bruselo. La kongresa temo estis aparte interesa por parolantoj de Esperanto: "La kontribuo de la aplika lingvistiko al internacia interkompreniĝo".

La partoprenantoj – 1 500 lingvosciencistoj kaj aliaj interesitoj el la tuta mondo – diskutis la temaron en ses sekcioj, dividitaj en tridek subsekciojn. Tiuj ses sekcioj estis: Lingvaj problemoj en evolulandoj, Socilingvistiko, Psikolingvistiko, Instruado kaj lernado de la lingvo, Komunikado kaj interagado, Logiko kaj lingvistiko.

Partoprenis la kongreson pluraj esperantistaj lingvofakuloj. En la sekcio Komunikado kaj interagado, François Simonnet (Francio) prezentis referaĵon pri "Originala sistemo de samtempa interpretado". Pro foresto de prof. Pierre Janton (Francio) Edward Symoens (Belgio) prezentis kaj komentis lian referaĵon "Lingvistika kriterio pri la internacieco: la traduko en Esperanto". Tiujn referaĵojn oni prezentis france, dum en la sekcio Lingvaj problemoj en evolulandoj, Edward Symoens prezentis "La lingvaj konsekvencoj de koloniigo" en la nederlanda. En la sekcio Socilingvistiko s-ino Maire Mullarney (Irlando) prelegis angle pri "Akceptebla alternativo al la angla". Ankaŭ la referaĵo "Formado de semantika elektronika vortaro por ĉiuj lingvoj" de Lothar Hoffmann (FR Germanio), en la sekcio Komunikado kaj interagado, aludis Esperanton en sia priskribo de la projekto Lingvo 2000.

Inter la dek ok specialaj simpozioj okazis simpozio pri Esperanto en la franca. Ĝi titoliĝis "La kontribuo de Esperanto al la internacia interkompreniĝo". Edward Symoens prezidis kaj enkondukis per prelego pri la Internacia Lingvo en historia perspektivo. Kunlaboris François Simonnet per konvinka enkonduko pri la lingvo mem. Marc Demonty (Belgio) komparis la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de planlingvoj kaj etnaj lingvoj. Oni taksis la trihoran simpozion plene sukcesa, kvankam oni estus povinta allogi pli da kongresanoj. Al la sukceso multe kontribuis la sagacaj intervenoj de neesperantisto, prof. Ahmed Moatissime, aŭtoro de libro, kiu nomiĝas "La franca lingvo kaj la plureco en Magrebo". Li konfesis, ke en Magrebo oni serĉas alternativon al la franca lingvo kiel internacia komunikilo.



Ĉeforganizanto kaj kontribuinto al la faka kongreso en Bruselo: E. Symoens (maldekstre) kaj F. Simonnet

Lingva aspekto de la kongreso, kiun notis la esperantistoj, estas, ke dum la unua kongreso de AILA en 1964 pli ol tri kvaronoj de la referaĵoj estis en la franca, sed ĉi-jare tiom prezentiĝis en la angla.

Prezidis la kongreson la direktoro de Instituto pri Vivantaj Lingvoj de la Libera Universitato (VUB) en Bruselo. Oni krome elektis lin kiel la prezidanton de AILA. Kvankam li ankoraŭ ne estas konvinkita, ke Esperanto havas estontecon, li mem proponis prezentadon de Esperanto-rilataj temoj en la kongreso, kaj dum la kongreso li regule insistis, ke la ĉeestantaj esperantistaj fakuloj konatigu sin al aliaj lingvofakuloj. Tamen la esperantistoj ankoraŭ sentis la relativan mankon de mallongaj nacilingvaj prezentoj de Esperanto taŭgaj por fakuloj.

Ĉiam ankoraŭ necesas pli bone organizita partoprenado de esperantistoj en tiaj internaciaj kongresoj. Ideojn kaj proponojn rilate al tio, same kiel proponojn pri kunlaboro sur tiu kampo, bonvenigas s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Kalmthout, Belgio.

La Dekoka Internacia konferenco de ILEI

En Škofja Loka, urbo en la norda jugoslavia respubliko Slovenio, okazis de la 14a ĝis la 21a de aŭgusto ĉi-jare la 18a Internacia Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). La Konferenco havis 102 partoprenantojn el 11 landoj. Se oni konsideras, ke 65 el tiuj konferencanoj venis el la najbara Italio, kaj 14 el Jugoslavio, dum partoprenis neniu ekstereŭropa instruisto, – ne estas malfacile konkludi, ke al la Konferenco mankis adekvata internacieco, kian oni atendas de tutmonda movada organizaĵo. Aliflanke, dum la 69a Universala Kongreso en Vankuvero kolektiĝis verŝajne pli ol 200 geinstruistoj. Ni konkludas tion el la *Kongresa libro*, kie inter tiuj, kiuj indikis sian profesion en la aliĝilo (iom pli ol 200 kongresanoj), troviĝas pli ol 60 instruistoj. Ĉar la Kongreso havis 802 aliĝintojn, estas facile kredi, ke tuta kvarono de tio estis geinstruistoj. ILEI tamen decidis ne kunveni tie sed – kiel kutime dum la lastaj dek jaroj – konferenci aparte.

La inaŭguron de la Konferenco de ILEI ĉeestis kaj salutis ankaŭ s-roj France Pivec, slovenia vicministro pri edukado, kaj Matiaš Čepin, urbestro de Škofja Loka. Nome de UEA la Konferencon salutis s-ino Emilija Lapenna, ĉefdelegito kaj honora membro de la Asocio. La lokan organizan laboron gvidis d-ro Peter Zlatnar, kiu tra multaj jaroj ĉefrolis en diversaj lernejaj aranĝoj de UEA kaj ILEI.

La ĉeftemo de la Konferenco estis "Esperanto en la sistemo de fremdlingva instruado". Pri tio jam en la inaŭguro prelegis s-ro Helmut Sonnabend, kiu pli ol dek jarojn estas prezidanto de ILEI. Multe rilatis al la temo ankaŭ la podia diskuto, kiu okazis en la Ministerio pri Edukado en la slovena ĉefurbo Ljubljana, kun partopreno de kelkdeko da konferencanoj. Same, la rezolucio de la Konferenco forte emfazas la propedeŭtikan valoron de Esperanto kaj atentigas pri la komplementeco de ĝia instruado kaj tiu de la fremdaj lingvoj.

En pluraj aliaj kunsidoj en Škofja Loka partoprenantoj revuis la nuna staton de la lerneja instruado de Esperanto kaj provis interŝanĝi spertojn. Laŭ la konferenca protokolo (el kiu ni ĉerpis la informojn por ĉi tiu teksto), plurfoje menciiĝis la manko de kunlaboro inter ILEI kaj UEA sur la kampo de la lerneja agado. Ne estas malfacile konstati, ke tiu kunlaboro efektive mankas kaj multfoje kaŭzas, ke la du organizaĵoj duobligas la laboron kaj okupiĝas pri la samaj demandoj, anstataŭ interkonsente dividi la taskojn. Siavice UEA komencis organizi pedagogiajn programerojn en la Univeralaj Kongresoj nur kiam ILEI ĉesis profiti el la multnombra geinstruista ĉeesto en tiuj kongresoj. Iam antaŭe ILEI planis siajn konferencojn proksime al la loko de la koncerna Universala Kongreso, lastatempe okazas tute male: kiam pasintjare UK estis en Budapeŝto, ILEI konferencis en Portugalio; ĉi-jare UK iris al Kanado, ILEI konferencis en Jugoslavio; venontjare la 70a UK okazos en Aŭgsburgo, kaj ILEI planas konferenci en Svedio. Iom da kunordigo geografia – por eĉ ne paroli pri la labora – vere necesas.

UEA transprenas la stokojn de TK/Stafeto

Ekde la 1-a de oktobro 1984, la libroservo de UEA transprenas ĉiujn stokojn de la eldonejo TK/Stafeto. Ni jam aludis tiajn planojn en unu el niaj pli fruaj revunumeroj ĉi-jare, sed la definitivigo de la koncerna interkonsento okazis nur komence de septembro, kiam la eldonisto Torben Kehlet revenis de la ferioj.

Tiu ĉi interkonsento praktike signifas, ke estonte TK/Stafeto tute ne okupiĝos pri la vendado de siaj eldonaĵoj, sed tiun rolon por ĝi plenumos la Libroservo de UEA. Estas tute kompreneble, ke ekde nun eblos aĉeti la librojn de TK/Stafeto ĉe UEA, kontraŭ la kutima revendista rabato de unu triono de la vendoprezo, ĉe minimuma mendo de 3 ekzempleroj de la sama titolo, ekspedotaj al la sama adreso.

Ĉio ĉi neniel signifas, ke Kehlet ĉesas okupiĝi pri la eldonado de Esperantaj libroj, sed ke li estonte volas koncentriĝi je la eldonado – kaj precipe je la presado – kio ĉiam estis lia ĉefa intereso. UEA mem jam presis kelkajn titolojn ĉe Kehlet (*Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, *La lingva esenco de Esperanto)* kaj planas estonte pliintensigi tian kunlaboron. Kehlet ŝatus, se ankaŭ la aliaj movadaj eldonistoj petus de li ofertojn pri la presado de siaj libroj, periodaĵoj aŭ aliaj Esperantaj eldonaĵoj.

Pri la loko de *Kiuj semas plorante...*

Juĝi verkon estas suverena rajto de recenzanto, sed Reto Rossetti dufoje asertas en sia recenzo de *Kiuj semas plorante...*, ke "la romano havas lokon en Ĉeĥoslovakio..." (vd. *Esperanto*, aprilo, p.71). La teksto eĉ ne per unu vorto aludas tiun landon.

Fakte la scenejo de la romano troviĝas en *imagita* lando, ie en centra Eŭropo. Ankaŭ la protagonistoj estas imigitaj. Tio gravas por eviti miskomprenon. Ni deziris eviti, ke la nacia aparteno de la kunaŭtoroj iel ajn sugestu falsajn konkludojn. Miskompreno de tiu ĉi fakto povus erarigi la leganton pri la esenco, nome ke *Kiuj semas plorante...* celas rememorigi pri la heroa pasinteco de nia Movado, pri la viktimoj de la persekutoj.

Éva Tófalvi kaj **Oldřich Kníchal, Hungario**

Inaŭguru Esperante kun samtempa interpretado

Mi plene konsentas kun la argumentoj, kiujn Tonkin donis pri la valoro, kiun alportas paroladoj de eminentuloj dum Universala Kongreso, ankaŭ se tiuj internacie gravaj personoj ne regas la Internacian Lingvon kaj do parolas nacilingve. Sed kio impresas strange kaj kongresanojn kaj ekstermediajn gastojn estas la fakto, ke temas pri *inaŭguraj festparoladoj*. Esperantistoj venas al Esperanto-kongreso ĉefe por aŭdi la Internacian Lingvon, kaj precipe en inaŭgura solenado ili atendas bonegan paroladon en Esperanto, ne en iu ajn alia lingvo. Mi tre bone memoras, ke la festparolado de la unua UK, kiun mi vizitis, definitive konvinkis min pri Esperanto.

Aliflanke neesperantistaj gastoj kaj ĵurnalistoj tiel povas ricevi la impreson, ke ne ekzistas kompetentaj Esperanto-oratoroj por tia okazo. Sendube estas pli efike, kaj malpli koste, doni al ĵurnalistoj kaj gastoj nacilingvan tradukon de Esperanta festparolado, ol Esperantan tradukon al plurmil kongresanoj.

Kompreneble kompetentaj neesperantistoj havu okazon paroli dum UK, sed la taŭga loko por tio estas laborkunsidoj, kie ili povas kontribui al la kongresa temo.

Cetere, por resti ĉe tradukado dum UK, multe pli grave estu, oferti samtempan interpretadon de Esperanto-paroladoj kaj -prelegoj. Ni ĉiam plendas, ke UK nek altiras la publikon de la koncerna lando nek efikas sufiĉe propagande. Efektive, kiel homoj povas konvinkiĝi pri la valoro de Esperanto, se ili ja legas pri tio en gazetaro, sed ne propra-orele spertas funkcion kaj avantaĝon de la Internacia Lingvo? Kial do ni ne ofertas dum UK samtempan interpretadon en la landan lingvon, ekzemple de la prelegoj de la Kongresa Universitato, de laborkunsidoj ks.? Kutime la kongresejoj estas ekipitaj per la necesa instalaĵo kaj, ĉar temas pri interpretado en nur unu lingvon, la afero ne estas tre komplika nek multekosta. La interpretistojn ni ja grandparte trovas en la propraj vicoj. Kaj la ordinara publiko kaj la ĵurnalistoj tiel ricevus multe pli fortan sperton, konvinkan sperton pri funkciado, valoro kaj avantaĝo de Esperanto.

Stefan Maul, FR Germanio.

Klarigo pri nia unua afrika vortaro

Mia *Vortaro de Esperanto kaj svahila* estas destinita al afrikaj studantoj de Esperanto. Tio estis la intenco de UEA, kiu petis min verki la libron.

Vortaro ne estas gramatiko. S-ro Cornice, kies recenzo de mia vortaro aperis en la aprila numero de *Esperanto*, ŝajne atendas du librojn por la prezo de unu. Vortaro ne estas lernolibro de lingvostrukturo sed konsultlibro.

Mia vortaro tamen estas multe pli granda ol UEA intencis. UEA klarigis, ke ne estas sufiĉe da mono disponebla. Tial mi rezignis pri ĉia honorario, por ebligi al UEA produkti pli grandan vortaron. Sed s-ro Cornice tamen ne estas kontenta. Mi bedaŭras, ke mi ne povis fari pli.

La vortformoj, kiujn s-ro Cornice nomas "strangaj", li ŝajne ankoraŭ ne aŭdis. Multaj parolantoj de la svahila diras *sabuini* anstataŭ *sabini* kaj preferas *dakitari* anstataŭ *daktari*, kiu estas malbona svahila. Tiel same *asikari* estas pli bona svahila ol *askari*. Eble s-ro Cornice konsultis la svahilan-anglan vortaron de Johnson, sed tiu verko ne estas perfekta kaj entenas multajn erarojn.

Jan Knappert, Britio

Komputotekniko por blinduloj

Provizi parolantan vortaron por blindaj esperantistoj estas grava tasko. Sed la solvo, kiun prezentis Raymond Gonin en revuo *Esperanto* de februaro (p.28), ne konformas al la hodiaŭaj eblecoj.

Mi havis la eblecon eksperimenti kun aparato, kiu kapablas prononci vortojn per sinteza homa voĉo. Ĝin evoluigis Instituto Heinrich Hertz en Berlino, kaj ĝi estas aĉetebla por kelkaj naciaj lingvoj. Unu celo de la aparato estas anstataŭigi ekranon aŭ tajpilon de komputoro.

La komputilo povas esti pli utila por blinduloj ol havi *Plena ilustrita vortaro* sur 180 kasetoj. La have-

blaj programoj sufiĉas por trovi certan vorton post kelkaj sekundoj. Per tiu sistemo ankaŭ aliaj dokumentoj estus atingeblaj de blinduloj, ekz. la Jarlibro kaj Librokatalogo.

Kompreneble, la bazaj kostoj de la komputora solvo estas pli altaj, sed ĝi permesas pli vastan uzon.

Krom la helpo al la blindaj esperantistoj, ĉi tiu solvo estas utila al ĉiuj esperantistoj, kiuj havas komputoron. Mi estas preta informi pli detale kaj kunlabori en la realigo (Möckernstr. 71, D-1000 Berlin 61, FR Germanio).

Roland Schnell, FR Germanio.

BELARTAJ KONKURSOJ 1984
ORIGINALA POEZIO: UNUA PREMIO

Fumo

Pensojn akcelas fajra kokaino
en ambaŭ ni; nur drogo versornamas
la blankon de l' foli'. Poemsordino

mian kapablon dampas, kaj mi pramas
tra via haŭto kaj racia penso
disonde... ve! ĉi plum' mokinde lamas

en labirintoj de la sensintenso,
kie aero svage disfluktua
forsvenas, senparfuma volv-incenso...

Jen fumo, fum'! Kaj ridas la vultua
vizaĝo de l' amiko. Pampelmus'
sur mia lito, kaj ektuŝ' unua

de ŝia frunto. La amiko ĵus
sidiĝis apud ni: lerta gitaro
muzikas, dum altiĝas sentoflus'.

Hej, krias knabo sur la trotuaro
mallarĝa! En ĉi flagra menstumulto
enormas bru': sed varma fajroklaro

intim-silentas. Sunumita ŝultro
kaj Donald Duck sur la tolaĵo flava,
de ĉi vespero jen la bonrezulto:

ni ŝtelis ion en la nokto kava,
kaj ni ne respondecos pri l' marodo,
pri l' amuziĝo. Ŝajnas ne tro grava

nia sekreta lumsoif': klopodo
al fino pli baldaŭa, kaj brokanto
de niaj lacaj korpoj... Sur komodo

flavgajas foliar' de helianto.

Mauro Nervi

Kalendaro

Kien ĝis la jarfino?

Tutjare

Kursoj, turismaj kaj kulturaj aranĝoj, Internacia Esperanto-Kursejo, Pisanica, Bulgario (IEK, P.k. 791, BG-1090 Sofia)

Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, B.P. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds) aranĝas kursojn, studsemajnojn, prelegarojn ks.

Oktobro

12-14 20a Kataluna Kongreso de Esperanto, Olot, Hispanio (Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat de Correus 32 318, Barcelona)

12-14 Sep-ŝtata Usona Esperanto-kongreso, Colorado Springs, Usono (J. Brugos, 144 Crystal park Road, Manitou Springs, CO 80829)

13-14 3a Internacia kadrokurso pri Esperanto-Turismo, Liĝo, Belgio (Esperantotur, Montoyerstr. 37 B 24, B-1040 Bruselo)

21-28 10a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo, Bydgoszcz-Toruń-Varsovio, Pollando (Esperantotur Pollando, Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)

26-28 Seminario pri organizado kaj informado, Oppenau, FR Germanio (s-ino M. Hektor, Fuchmattstr. 23, D-7602 Oberkirch)

Novembro

02-04 Semajnfino de FLEJA-JEB (flandra kaj brita junularoj), De Pinte, Belgio (s-ino Ilse Jacques, Molenstr. 29, B-2018 Antwerpen)

09-11 Seminario pri ekologio, Hamburgo, FR Germanio (G. Roemer, Lutterothstr. 17, D-2000 Hamburg 19)

15-18 6a Konferenco pri Internacia Lingva Komunikado, Łodz, Pollando (F. Kruse, Mathildenstr. 73, D-2800 Bremen 1, FR Germanio)

24-25 2a Festivalo de Teatro kaj Kanzono, Parizo, Francio (UFE, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)

30-02 dec. Festivalo de Filmo kaj Video, Poreć, Jugoslavio (Internacia Kultura Servo, P.f. 499, YU-41000 Zagreb)

Decembro

08 30a datreveno de la aprobo de konsultaj rilatoj inter Unesko kaj UEA

10 Tago de Homaj Rajtoj

14-16 2a Tutbharata Esperanto-Kongreso, Kalkato, Hinda Unio (S. Pal, 35/1 Swami Vivekananda Road, Howrah 711 101)

15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
Tago de la Esperanta Libro

27-03 jan. 28a Internacia Seminario, Köln-Riehl, FR Germanio (Germana Esperanto-Junularo, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1)

28-02 jan. Vintra Esperantista Ferio, Budapeŝto, Hungario (Budapeŝta Komitato de HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)

31 Kotizoj de la Universalaj Kongresoj altiĝas



Kongresa Komuniko

70a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Aŭgsburgo (FR Germanio)
3-10 aŭgusto 1985
Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Adreso de LKK: Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg, FR Germanio.

Loka Kongresa Komitato: La membroj de LKK venas el diversaj urboj de la germana federacia ŝtato Bavario. Prezidas d-ro Ludwig Röll; vicprezidantoj estas s-roj Anton Kribel kaj Erich Sandner; sekretario kaj protokolsekretario estas respektive ges-roj Hermann kaj Margarete Schmid, kaj la kasisto estas s-ro Friedrich Hilpert. Ceteraj taskoj estas asignitaj jene: Kongresejestro: s-ro Siegfried Schlumberger; Ekskursoj: s-ino Stefanie Tucker; Loĝado: s-roj Gerald Tucker kaj Klaus Meschke; Junularaj aferoj: s-ro Michael Scherm; Enlanda informado: s-ro Reinhard Fössmeier; Eksterlanda informado: s-ro Ljubiša Jevtić; Handikapuloj: s-ro Franz Spielmann; Diservoj: pastro Josef Grabmeier; Postkongreso: s-ro Armin Grötzner. Krome oni nomis kiel revizorojn s-rojn Rudolf Brand kaj Willi Lehmann.

Kotizoj: Malgraŭ inflacio oni sukcesis teni la aliĝkotizon sur la nivelo de 1981, t.e. la baza kotizo restas je 125 gld. La tarifo dum la unua kotizperiodo (valida ĝis la 31a de decembro) estas la sekva (ĉiuj prezoj estas en nederlandaj guldenoj):

Kat. 1: Ne membro de UEA	156
Kat. 2: Individua membro de UEA (baza kongreskotizo)	125
Kat. 3: Kunulo/junulo/handikapulo, kiu ne estas membro de UEA	94
Kat. 4: Kunulo/junulo/handikapulo, kiu estas membro de UEA	62

Nur kongresanoj el FR Germanio rajtas pagi per germanaj markoj rekte al la adreso de LKK.

La karavana kotizo (por grup-aliĝoj de 25 aŭ pli da personoj) estas 90% de la baza kotizo. Atentu, ke ĉiuj kotizoj altiĝas post la fino de 1984.

La kongresa temo: En 1985 la urbo Aŭgsburgo festos la dumiljaran jubileon de sia fondiĝo en la romia epoko. Konscia pri tiu grava evento, kiu koincidas kun la UK, la Estraro de UEA elektis por la kongresa temo jenan titolon: "Antikvo kaj moderno: kion ŝanĝi, kion konservi?"

Internacia Kongresa Universitato (IKU): La 38a sesio de IKU okazos en la kadro de la 70a UK sub la rektoreco de prof. d-ro Helmar Frank. Universitataj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj estas invitataj proponi prelegon antaŭ la 10a de januaro 1985 al la Komisiono pri IKU ĉe ties sekretario: prof. Bruce Sherwood, 252 Engr. Res. Lab., 103 S. Mathews, Urbana, IL 61801, Usono. Al tiu adreso oni sendu fotoportreton kaj kvar kopiojn de titolo, resumo, bibliografio kaj biografieto. Prelegantoj ricevos danksumon sed ne vojaĝkostojn.


Artaj aranĝoj: Dum la pasinta UK la Komitato de UEA starigis novan Komisionon pri Artaj Aranĝoj. Interalie ĝi havas la taskon konsideri ĉiujn proponojn por la arta programo de la UK. Se iu unuopulo aŭ grupo volas proponi sin por, ekzemple, la Teatra Vespero aŭ la Internacia Vespero, tiu skribu al la konstanta adreso, kiu plusendos la proponon al la komisiono. Sinproponoj atingu la konstantan adreson antaŭ la 10a de januaro 1985.

Ĉirkaŭkongresaj aranĝoj: De la 22a ĝis la 29a de julio okazos la 41a Internacia Junulara Kongreso

Jam aĉetebla:
la glumarko de la 70a UK, Aŭgsburgo 1985.

Sed ne temas pri unu glumarko – temas pri NAŬ malsamaj originalaj desegnaĵoj de aŭgsburgaj vidindaĵoj; ĉiu glumarko, verde, ruĝe kaj nigre presita, mezuras 53 × 34 mm, estas memglua kaj bonege reklamas kaj la Kongreson kaj Esperanton.

Prezo por 100 ekz. (minimuma mendokvanto): **9,90 gld.** (por Nederlando: 11,78 gld.) inkluzive la afrankon. Triona rabato ekde 300 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



(IJK) en Eringerfeld, FR Germanio. Adreso de LKK: Postfach 101422, D-2000 Hamburg. Aliĝintoj, malpli ol 26-jaraj je la 1-a de januaro 1985, rajtas aliĝi senpage al la 70a UK.

Tuj antaŭ la UK (27 julio-2 aŭgusto) eblas partopreni la 53an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en hotelo Alpenhof, Aŭgsburgo (pliaj informoj de la loka reprezentanto de LIBE, s-ro Theodor Speckmann, Triererstr. 45, D-5000 Köln 1; tel. 0221-243496) aŭ dum la samaj datoj ekumenan kongreson en "Kolpinghaus", Aŭgsburgo (pliaj informoj de pastoro Adolf Burkhardt, Untere Str. 39, D-7311 Bissingen/Teck; tel. 07023-6230, aŭ de pastro Bernard Eichkorn, Kolpingerstr. 8, D-7790 Messkirch; tel. 07575-3620).

Jam la programo por la Postkongreso en Kronach de la 11a ĝis la 18a de aŭgusto estas preta. Ĝi antaŭvidas ĉiutagajn ekskursojn al multaj bavaraj urboj kaj regionoj, oficialan akcepton en Kronach, vizitojn al Germana DR, ekumena diservo ktp. Plenaj detaloj aperos en la Dua Bulteno de la UK, aperonta en la komenco de 1985, sed pliaj informoj (ekzemple por tiuj, kiuj ne partoprenos la Universalan Kongreson) estas jam nun haveblaj de s-ro Armin Grötzner, Giessübel 36, D-8640 Kronach-Gehülz.

Reklamiloj: La aŭtomata afrankilo de Germana Esperanto-Asocio stampas ĉiun poŝtaĵon per invito al la UK. Dum la kongreso eblos ricevi poŝtan stampon de la federacia poŝto kaj la ŝtato jam subvenciis la eldonon de tre bela prospekto (vidu p. 116 de revuo *Esperanto*) en 35 000 ekzempleroj. La urbo Aŭgsburgo subvenciis la eldonon de urba prospekto, de belega afiŝo (mendebla de la supraj adresoj) kaj de la Unua Bulteno. LKK disponas pri Esperanta filmo pri Aŭgsburgo, per kiu ĝi reklamas la kongreson; la filmo estas kolora kaj daŭras proksimume duonhoron.





Glumarkoj: Aldone al la supra listo de reklamiloj ni atentigas pri la aparte belaj glumarkoj de la 70a UK. Ĉiu folio surhavas naŭ memgluajn markojn kun malsamaj desegnaĵoj en tri koloroj. Cento da ili kostas 9,90 gld. kun triona rabato ekde 300. Mendu de UEA ĉe la konstanta adreso.

ENKETO PRI LA 69a UK

Favora reago

Ĉirkaŭ 12% de la vankuveraj kongresanoj redonis al la kongresa administracio sian enketilon. Ni notis la respondojn, laŭdojn kaj plendojn kun granda interesiĝo kaj ĉi-pere prilumas la plej signifajn punktojn.

Inter pli ol 120 programeroj nur la ĉefaj altiris analizindan reagon de la kongresanaro. Ĉiuj ĉefaj programeroj ricevis meze poenton, kiu signifis "kontentiga"; eble kongresanoj estas malpli kritikemaj ol ni supozis. Jes aŭ ne, ni povas konstati, ke la elstare sukcesaj eroj estis la prelegserio de d-ro Wells, la IKU-prelego de prof. Sherwood kaj la Aŭkcio. Pri solenaĵoj (Malfermo, Inaŭguro, Fermo) la kongresanoj pozitive esprimiĝis, same kiel pri la Teatraj Vesperoj, sed regis iom malpli da entuziasmo pri la Ĝeneralaj Kunsidoj kaj pri la Internacia kaj Nacia Vesperoj.

Ŝajnas, ke multaj kongresanoj, kiuj interesiĝas pri ekskursoj, ne interesiĝas pri enketiloj kaj (eble) la cetera programo, ĉar ni ricevis tiom malmulte da komentoj de ekskursintoj. Tio estas bedaŭrinda; ni konstatas, ke kongresanoj tre ŝatas ekskursi kaj la tri pasintaj UK-oj provizis escepte multajn ekskursojn, pri kiuj estus utile havi takson.

Ni timis ricevi mallaŭdojn pri la loĝado. Jam en la Dua Bulteno ni konfesis pri ĝiaj mankoj kaj ni scias, ke ĝi estis altekosta laŭ ne-nordamerikaj normoj (kvankam malaltekosta laŭ kanadaj normoj!). Tamen 70% de la kongresanaro fine uzis la kongresan loĝejon kaj, laŭ la enketiloj, alte taksis ĝin. Ĝia proksimeco kaj bona stato ŝajne pravigis nian decidon rekomendi ĝin, sen paroli pri la aŭtobusa striko, kiu subfosis veturadon inter la urbo kaj la kongresejo!

La respondoj al demandoj pri kongresaj eldonaĵoj kaj servoj senescepte ĝojigis nin. Ni ne surpriziĝis konstati, ke la *Kongresa kuriero* ricevis la plej altan mezan poenton kaj la plej altan nombron de respondoj en la enketilo. Malgraŭ bona noto, ni sentas la bezonon dediĉi eĉ pli da atento al niaj mapoj kaj indikiloj.

La plimulto de niaj respondintoj estis pli ol 65-jaraj kaj venis unualoke el okcidenta Eŭropo, dualoke el Nord-Ameriko. La divido inter viroj kaj virinoj estis egala. Meze, Vankuvero estis preskaŭ la oka UK, kiun ili ĉeestis; la amplekso de ĝia programo estis ĝusta por preskaŭ ĉiuj, malgraŭ pluraj komentoj pri samtempaj programeroj, kiuj konfliktis. Estas interese nun rerigardi p. 189 de nia numero de novembro 1983 por fari kelkajn komparojn.

Diccon Masterman

Emfaze rekomendinda legolibro

Faktoj kaj fantazioj; Progresiga legolibro, Marjorie Boulton (1924). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 431p. Ilus. 21cm. ISBN 92 9017 028 X. Prezo: 36,00 gld.

Antaŭ nelonge mi uzis en artikolo (vd. *Esperanto*, aprilo 1984) la esprimon "tridimensia progreso" por priskribi lingvostudadon, kiu koncernas ne nur lingvan sistemon kaj cirkonstancan aplikadon de la lingvo, sed ankaŭ laŭgradan alproprigon de la kultura fono de lingvo kaj taŭgan informadon pri kulturaspektoj sur internacia skalo. Laŭ mia takso tiu ĉi nova lernolibro de Marjorie Boulton garantias "tridimensian pro-



greson", disvolvante ĉiujn tri aspektojn: lingvon, uzadon kaj kulturon en abundaj, saĝe proporciaj kvantoj. Per sia libro d-rino Boulton ankoraŭ pli altigis sian reputacion en nia kulturmondo, ĉi-foje per grandioze malavara disdono de siaj pedagogiaj scioj kaj spertoj, kiujn ŝi jam de multaj jaroj aplikadis en bone konataj anglalingvaj verkoj.

Marjorie Boulton antaŭklarige priskribas siajn principojn en la verkado de sia libro. Ili sumiĝas je universaleco, neŭtraleco, varieco, gradigado, emfaza pligrandigo de vortostoko. Universalecon ŝi atingas per mondrigardo, ne konstateble limigita de ŝia eŭropaneco, per fabeloj el ĉiuj mondopartoj, per aludoj al pluraj religioj, per sugestoj pri diversaj vivostiloj. Neŭtralecon ŝi sekvas en la spirito de UEA, tamen akcentante, ke tio ne signifas mankon de opinioj laŭ principoj komunaj al bonintenculoj de diversaj ideologioj. Varieco egalas ĉe ŝi al la bazo de intereso, kies motorojn spegulas la titolo: *Faktoj kaj fantazioj*. Gradigadon garantias saĝaj gramatikaj konsideroj en kombino kun plejparte relative simpla stilo kaj sistema enkonduko de multaj utilaj esprimrimedoj, ofte malmulte regataj de postkomencantoj. Pligrandigon de vortostoko karakterizas la tendenco al universaleco, ekzemple prezento de fakterminoj kaj de multaj vortoj pri ekstereŭropaj fenomenoj.

Eble la plej karakteriza trajto de la libro de Boulton estas ĝia originaleco. Ĝi ne estas tia legolibro, kiu konsistas el elektitaj pecoj el Esperantaj verkoj – speco ankaŭ ja nemalhavebla – sed originala tutaĵo, bele atestanta pri la persono mem, kiu ĝin kunmetis kaj verkis. Se oni eble povus diri, ke multaj pecoj, ekzemple la fabeloj, estas tradukoj, ili tamen ne estas simplaj tradukoj, sed rekreitaj verkoj, klare portantaj la stilajn ecojn, kiuj ĝenerale karakterizas la stilon de Boulton, vervan klarecon de rakonta humuro, paralelismoj, antitezoj, varieco de frazaj strukturoj, trafaj vortelektoj. Ankaŭ veraj originaloj abundas; kiel atendeble de poeto, versoj ne mankas, kiuj kombinas ĉarmon kaj gramatikan utilon. Multajn "novajn proverbojn" ŝi kreas, kiuj inde aldoniĝas al nia kultura stoko sur tiu tereno: "Al fina gloro – per teda laboro", "Ne postulu de paruo saltojn de kanguruo", "Pli facile krei proverbojn krajone, ol mem konduti saĝe kaj bone!" Informaj ĉapitroj rekte rilataj al la lingvo kaj la Movado estas substancaj kaj trafaj, kaj ĉiam prilumitaj de tia aŭtentika humanismo, kia esence karakterizas la verkojn de Marjorie Boulton. Ŝiaj frazoj ofte enhavas memorindajn kernojn, simple-arte vortitajn: "Per faktoj kaj fantazioj niaj mensoj kreskas. Ankaŭ per nova lingvo kreskas la menso; kaj per Esperanto ĝi ofte kreskas multe".

El pedagogia vidpunkto la libro estas zorge strukturita. Ĝi estas dividita en 52 ĉapitrojn, ĉiu semajnajn taskojn por progresa studojaro. Ĉiu ĉapitro havas komencan ĉeftekston, kies temo estas varia, jen fabelo, jen konsiloj al la kreskanta esperantisto, jen informoj pri la Movado aŭ la lingvo, jen meditoj pri iuj aspektoj de la vivo, ĉiam konkrete subtenataj. La ĉeftekston sekvas rakontetoj, anekdotoj, versaĵoj, proverboj, klerigaj informoj. La varieco garantias intereson kaj maltedon, la enhavo edukiĝon, la stilo emfazan kaj memorindan koheron.

La libro celas "progresantojn", tiujn, kiuj finis elementan kurson pri Esperanto kaj deziras plue konstrui siajn sciojn ne nur vortaran, sed ankaŭ sintaksan kaj stilan. Ĝi estas aparte taŭga por privata studado, sed certe ankaŭ estas tre utila por progresigaj kursoj sub gvido de instruisto. Manko de solven-

daj taskoj, demandoj ks. laŭ mi ne multe ĝenas, la celo de la libro estas unuavice instigi al aktiva, frukta legado, kia agnoskinde estas la plej grava studekzerco. Por legemuloj ĝi estas ampleksa regalo: 416 paĝoj da tekstoj plus dekpaĝa glosaro de vortoj, kiuj eble ne troviĝas en ĉiu Esperanto-nacilingva vortaro. Resume: unika libro, plej emfaze bonveniginda kaj rekomendinda al ĉiuj studantoj de la Internacia Lingvo.

Baldur Ragnarsson (Islando)

Klara prezento de la terscienco

Ĉu vi konas la Teron?; Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj, Endre Dudich. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro de UEA, 1983. 150p. (+ 68p. da anoncoj). Ilus. 23cm. ISBN 963 571 080 1. Prezo: 12,00 gld.

Aperis la unua libro eldonita de Scienca Eldona Centro de UEA. Ĝi estas verkita de d-ro Endre Dudich, kaj ĝi temas pri la Tero. Estis feliĉa ideo komenci la serion de sciencaj eldonaĵoj en Esperanto per la bazo de nia ekzistado, la propra Tero. Kaj estas granda honoro por mi povi recenzi ĝin.


Ĉar temas pri scienca verko, oni devas krom la lingva aspekto ekzameni la kvalitojn fakan, tipografian kaj celan.

Ĉu vi konas la Teron? estas enkonduko en la geologian sciencon. La teksto pritraktas en mallongaj ĉapitroj ĝiajn diversajn fakojn. Kio tre trafis min, estas la tre moderna kaj facile komprenebla alproksimiĝo al la temo. La aŭtoro lerte, koncize kaj kelkfoje eĉ sprite gvidas nin tra la pluraj geologiaj fakoj, klarigante la signifon de ĉiuj kaj prezentante ilian utilecon por ebla profitiga apliko. Sinsekve, laŭ la plialtiĝanta strukturiteco de la objektoj, estas skizitaj la geonomio (interrilatoj inter geologio kaj aliaj sciencoj), geokemio, mineralogio, dinamika geologio, petrologio (de magmaĵoj kaj sedimentoj), paleontologio (la pravivo), tektoniko kaj terinterno, terhistorio kaj stratigrafio, aplikaj geofiziko kaj geologio, kosmogeologio kaj planedologio. Utila geologia glosareto finas la eksplikan tekston. La lastajn paĝojn, cetere presitajn sur malsamkolora papero, okupas anoncoj de diverstipaj hungaraj tersciencaj entreprenoj, kiuj ofertas siajn servojn ĉefe al triamondaj landoj, prezentantaj ilin en formo de sciencaj kaj teknikaj, krome tre interesaj kaj trafaj, fakaj artikoloj. Resume, senriproĉa faka alproksimiĝo.

Laŭ lingva vidpunkto la teksto estas en klara kaj facile legebla stilo. Ĝi montras, ke eĉ en iom klasika Esperanto, kvazaŭ sen neologismoj, oni povas verki sciencan libron. Fakte, la novaj vortoj estas pli fakterminoj ol veraj neologismoj; la aŭtoro prezentas tiujn terminojn kun ilia klarigo inter krampoj, aŭ inverse, tiel ke oni ne bezonas konsulti la glosaron, en kiu tiuj vortoj eĉ ne aperas. Tamen, la troa kaj ofte nenecesa uzado de ligstreketoj iom ĝenas. Ĉu ankaŭ necesis uzi *permeabla* anstataŭ "tralasiva", *dura* anstataŭ "malmola"? Kaj la konsekvenca uzado de *rokaĵo* anstataŭ la pli ofte uzata "roko", sen iu ajn pravigo? Oni certe povas diskuti pri la elekto de iu aŭ alia faktermino – ne ĉiuj plaĉas al ĉiuj – sed, se oni konsideras la elektitajn terminojn pli profunde, oni devas konfesi, ke plej ofte la aŭtoro pravas. Cetere, kion oni preferu: "kronostratigrafio" aŭ *ĥronostratigrafio*, "barhano" aŭ *barĥano*, "brekĉio" aŭ *brekcio* (kp. *PIV* "breĉio"); ĉu *fango* ne estas "ŝlimo"? Ankaŭ *nekontinuo* estas preferinda ol "malkontinuo" en terinterno. Mi donis kelkajn ekzemplojn, tamen preskaŭ ne eblas doni pliajn. Do, gratulojn pro la preskaŭ perfekta teksto laŭ la lingva vidpunkto.

La presarta aspekto meritas iom da kritiko. Ni ne parolu pri la bela kaj trafa kovrilo, kies malantaŭa parto montras geologian mapon. Ni pli bone demandu, ĉu vere necesis du diversaj specoj de papero por la presado de la libro (mi ne aludas al la propaganda parto, sed al la teksto de la aŭtoro). Krom tio, la intenseco de la presado ne estas egala: en kelkaj paĝoj oni uzis tiom da inko, ke la teksto preskaŭ makuliĝis, dum en aliaj paĝoj oni ŝparis la inkon tiamaniere, ke pluraj literoj preskaŭ malaperis. Cetere, la uzita papero ne taŭgas por reprodukti fotojn. Preserarojn mi preskaŭ ne trovis, tamen la manko de indiko de tabelo 15 iom ĝenas, kiel ankaŭ sur paĝo 91, "3,1 milionjaraj" anstataŭ *3,1 milmilionjaraj*. Kaj kial la aŭtoro ne presigis la nomojn

Skemo de laboro per la sisma metodo de reflektitaj ondoj



de specoj kaj genroj de vivuloj en kursivaj literoj, kiel postulas la kutimo? Resume, la tipografia parto meritas iom pli da zorgo.

Ĉu vi konas la Teron? estas scienca libro. Ĝi ne taŭgas por personoj, kiuj posedas apenaŭ unuagradan instruitecon. Sed tiuj, kiuj havas bazan konon de la natursciencoj, certe profitos multon el la libro. Ĝi ne estas baza teksto por studentoj, kiuj intencas diplomiĝi pri geologio, sed jes por tiuj, kiuj bezonas la geologion kiel kromfakon en aliaj sciencoj kaj teknikoj, kiel ekzemple la geografio, naturhistorio, kemio kaj inĝeniera arto. Al tiuj personoj mi profunde rekomendas ĝin, aldone al tiuj, kiuj simple interesiĝas pri la baza terscienco kaj ĝia aplikado.

Mi gratulas la aŭtoron, Sciencan Eldonan Centron de UEA kaj la kunlaborintajn hungarajn asociojn kaj instancojn, kiuj ebligis ĉi tiun eldonon en Esperanto. La ekzemplo estu baldaŭ sekvata de samnivelaj verkoj por la aliaj sciencoj.

Nuntempe, la plimulto de la sciencaj libroj – pro la ne tre multnombra legantaro – estas ege multekosta. *Ĉu vi konas la Teron?* sukcesis fuĝi de tiu regulo.

J.M. Mabesoone (Brazilo)

Kampara filozofio

La kunikloj de mia avo/I conigli di mio nonno, Giovanna Sarandrea. El la itala trad. Lina Gabrielli. Ascoli Piceno: Edizioni Gabrielli, 1983. 60p. Kolorilus. de C. Noce. 31cm. Dulingva eldono itala-Esperanta. Fabelserio Plejado. Prezo: 33,00 gld.

Dek du tutpaĝaj koloraj desegnaĵoj ilustras tion, kion la subtitolo pli konkretigas: Historio de vilaĝo. La tekstoj estas dukolumnaj, la itala kaj Esperanto unu apud la alia, kio cetere permesas testi la kvaliton de la traduko.

En la enkonduko oni informiĝas, ke *La kunikloj de mia avo* estas "miksaĵo de filozofio, psikologio, historio, sentemo, tradicio: la malgranda filozofio de la olduloj de la montoj, kion la nuna junularo kelkfoje taksas kiel indiferenteco, vivkvieteco" (tiele). Oni proponas la ĝenron "fabelo" por karakterizi la tuton.

La libro rakontas pri "Gaspaĉjo", kiu antaŭ la morto de la edzino – laŭ ŝia propono – konstruas kuniklejon en apuda groto, por havi okupon en la maljuneco, kiu helpus al li venki la solecon. Li nepre volas resti en sia montara domo, kaj vanaj restas la persvadoj de la gefiloj veni kun ili al la urbo. Vere la kunikloj helpas al li ne malesperi, kiam la edzino "estingiĝis".

Du junuloj ŝtelas la kuniklojn kaj Gaspaĉjo petas helpon de la "karabenistoj", kiuj siavice petas helpon de la faŝistoj, ĉar mankas policejo en la vilaĝo. Tiuj sukcesas kapti la ŝtelintojn kaj redonas la kuniklojn al Gaspaĉjo dum granda ceremonio, kiun ili uzas por propagandi sian ideologion.

Iun tagon oni trovas la maljunulon apud la kunikloj en la groto. Per tiu "foriro" finiĝas la simpla rakonto, en kiu oni fakte retrovas la promesitajn erojn. Miaopinie oni povus oferti, anstataŭ la fuĝo en la okupon, analizadon de la problemaro estiĝinta el la soleco, por provi kompreni siajn (ankaŭ malagrablajn) sentojn, por trovi komprenemon kaj solidarecon de amikaro, por refortiĝi kaj por fine povi akcepti sian situacion, apogante sin sur la amikoj kaj tiel ne resti sola. De tiu vidpunkto la enhavo ŝajnas al mi iom



banala. Tio koncernas rekte la aŭtorinon, sed duavice la eldonistinon kaj tradukintinon de la Esperanta versio. Ĉu ne troviĝas pli tradukindaj libroj?

Mi ne volas listigi preserarojn aŭ vortfuŝojn, sed kelkfoje la leganto devas konsulti la italan tekston, por kompreni kion oni celas. Tiu, kiu tradukas *stati d'animo* per "statanismoj", ne komprenas la Esperantan vortfaradon.

Karl Trimborn (Nederlando)

Mikspoto beletra

Mediteme, Oldřich Kníchal (1939). Prago: Čeňa Esperanto-Asocio, 1980. 73p. Ilus. 20cm. Prezo: 4,80 gld.

Feliĉe mi ne estas bibliotekisto kaj ne devas temklasifi ĉi tiun libron. Ĝi ne estas dika, sed enhavas multon tre malsaman, tamen ne malharmonie. Tri beletraj prozaĵoj, tri ekstereŭropaj vojaĝimpresoj, unu priliteratura eseo, kvar tradukoj el la ĉeňa literaturo. Jen malgaja rakonto, jen kelksekunda milita memoraĵo, kaj jam cento da japanaj temploj aŭ malvarma luna lumo. La rakontanto mallonge postenas en Kubo, kaj jam kaptas lin la dummilita romano *Kiel akvo*

de l' rivero (1963) de Raymond Schwartz, kiun li rerakontas resumante, interpretante kaj komentante. Same mallongajn kiel zorge elektitajn specimenojn Kníchal prezentas tradukante el la verkoj de Olbracht, Vančura, Majerová kaj Řezáč, ĉiuj apartenantaj al la unua duono de ĉi tiu jarcento.

Kníchal verkas lerte kaj esprimpove en freŝa kaj facile fluanta lingvaĵo. Koncizaj informoj pri la aŭtoroj, kies verkojn li tradukis, kaj pri Kníchal mem kompletigas la libreton, kiu cetere montras, ke eblas per modestaj iloj produkti presaĵon kun bela kaj malteda aspekto.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Interesa infanaĝo, sed sen lingva prizorgo

Etulaj aventuroj, Zora Heide (1924). Stokholmo: Författares Bokmaskin, 1983. 103p. Ilus. 21cm. ISBN 91 7328 388 6. Prezo: 12,60 gld.

La ok originale verkitaj rakontoj pri la infanaĝo, ĉu ili estas ŝiaj propraj travivaĵoj, ĉu skribitaj laŭ la rakontado de ŝia patro, ĉiuj revenigas al la leganto la infanecon. La temoj estas tre variaj, kiel estas varia la normala infana vivo, kaj ili estas tipe infanaj; simbole tion indikas la rakonto "Malantaŭ la pordo", kiu estas brila, detalega, plastike stariganta antaŭ ni la interese riĉan kutimaron, ligitan kun geedziĝo en jugoslava vilaĝo, kiun la infano ĉeestas, sed kiu ĉesas antaŭ la pordo de la ĉambro de la juna paro: tio jam estas la mondo de la "grandaj".

La aŭtorino kun ŝato bildigas kaj lerte karakterizas la homojn, helpe de kio ŝi sukcesas elvoki la impreson de tute alia mondo, de la mondo de sia infaneco, al kiu – malgraŭ tio, ke ŝi jam longe vivas en alia lando – ŝi konservis tre koran rilaton, kiun malfortigis nek la distanco nek la tempa malproksimeco.

Etulaj aventuroj estas rakontoj pri infaneco, sed ne por infanoj. Laŭmotive ili eble povus esti, sed la prezentmaniero havas la ambiciojn de "serioza literaturo", ankaŭ per la morala instruo, kiun la rakontoj enhavas.

Se oni tre pozitive akceptas la teman flankon de la libreto, oni bedaŭrinde ne povas senrezerve akcepti la lingvaĵon. La libro estas por personoj, kiuj bone regas la lingvon – kiuj kapablas kompreni "kion la poeto volis diri". La esprimmaniero ofte estas senutile komplika (ekz. "oksigene plena arbaraero", "fali en dormon", "mi malleviĝis teren"). Montriĝas nacilingva pensado, vestita en Esperantaj vortoj. Tro ofta estas la malĝustaj uzo kaj neuzo de la artikolo, ĝena estas la sisteme malĝusta uzo de la prezenco kaj absoluta neuzo de partikloj kaj estas eble kritiki ankaŭ la uzon de la direktomontra *-n*, de la refleksiva poseda pronomo, de *-inta* kaj *-anta*, kaj la tro oftan uzon de la pasivo...

Esperanto havas relative liberan vortordon, sed ĝi estu logika. Se oni cele al akcentigo metas la objekton aŭ alian frazparton sur la unuan lokon, tio devas havi sian pravigon. Tro ofta akcentado, precipe nepravigita, estas monotona kaj enuiga. Ankaŭ la vortelekto sufiĉe ofte haltigas la leganton, ekz. "Ĉiuj ĉasas nur fungojn...", "respektoplena" anstataŭ *respektoveka*, "miaj okuloj senĉese cirkulas ĉirkaŭe por ke neniu embarasu min ŝultre...", "bendo" anstataŭ *rubando* ktp. Mi trovas malĝusta ankaŭ la uzadon de adjektivo anstataŭ genitivo aŭ prepozicia kazo, ekz. "la junulina domo" anstataŭ *la domo de la junulino*. "la justeca lukto" anstataŭ *la lukto por la justeco* kaj "kiom - tiom" anstataŭ *kiel - tiel* ks.

Tia troigo kiel "Subite kaj kun la rapideco de fuzaviadilo, survoje al sia kuŝejo, preterkuras leporo" vekas rideton, sed tio ne sufiĉas por kompensi la bedaŭron, ke pro la lingvaĵo la leganto ne povas plene ĝui tiujn ĉi teme interesajn rakontojn.

Eduard V. Tvarožek (Ĉeĥoslovakio)

Zorga prezento de malgranda lingvo

La retoromanĉa; Sorto de la plej malgranda nacia lingvo de Svislando, Arthur Baur. Bellinzona: "Hans Dubois", 1984. 59p. Mapo. 30cm. Prezo: 21,00 gld.

Laŭ la vortoj de la aŭtoro ĉi tiu libro estas la unua en Esperanto, kiu detale pritraktas la romanĉan, lingvon parolatan de proks. 50 000 homoj en orienta Svislando. La termino "lingvo" estas abstraktaĵo, ĉar ekzistas nur aro da dialektoj, kiuj havas komunajn trajtojn. Tiuj dialektoj estas tiel malsimilaj, ke laŭ akademiano Gregor (kies ampleksa 288-paĝa anglalingva verko pri la sama temo mankas en la bibliografio) parolantoj de du dialektoj konversacias en la germana por bone kompreni unu la alian.

Arthur Baur prezentas la lingvon, donante pli da atento al sociaj, historiaj kaj geografiaj faktoj ol al ĝia strukturo.

La dialekteco ricevas merititan atenton. Por doni ekzemplojn la aŭtoro devis elekti nur unu dialekton kaj elektas la puteran (formon de la engadina). Estas ŝoke vidi, ke eĉ la organizo "Romanĉa Ligo" havas duoblan nomon: Lia Rumantscha/Ligia Romontscha (p.40).

Kvankam Baur ne diras tion, la situacio, kiun li priskribas, estas frape simila al tiu en aliaj landoj, ekz. en Kimrujo. Prave li skribis: "Sen la subteno de la lernejo malgranda lingvo estas kondamnata al morto". Pri tio oni konsciiĝis en Kimrujo dum la pasintaj 20 jaroj.



La longe atendita legolibro por progresantoj

– komisiita de UEA
– ideala por memlernantoj kaj gvidantoj de progresigaj kursoj
– de la fama verkistino

Marjorie Boulton

FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

★ ekzercigas pri frazkonstruado
★ kreskigas skrib- kaj parolkapablon
★ pligrandigas la vortostokon de la leganto
★ uzas simplan stilon en 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo.

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1984. 432p. Ilustrita de Alex Brychta. 21 cm. ISBN 92 9017 028 X. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 36,00 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

Interese estis legi pri la publikigo de la Nova Testamento en unu dialekto jam en 1560. Same okazis en Kimrujo en 1567, kaj oni rajtas pretendi, ke sen tiaj religiaj tekstoj pluraj malgrandaj lingvoj estus jam mortintaj. Kiel ankaŭ la kimra, la romanĉa suferas pro forta enmigrado de alilingvanoj kaj de t.n. miksitaj geedziĝoj.

La libro postlasas pozitivan impreson pri la grandega laboro farata por savi la lingvon. Tiurilate helpos la lastatempa kreo de komuna skriblingvo "Rumantsch Grischun", kiun Baur klare priskribas.

Bona laŭ enhavo, la libro estas malpli bona laŭ aspekto. Ĝi konsistas el fotokopioj de tajpitaj paĝoj. Kelkloke la tajpado estas tro hela kaj ne mankas tajperaroj. La nivelo de la libro estas tia, ke laikoj povas facile kompreni ĝian enhavon. D-ro Baur meritas gratulon pro libro, kiu zorge kaj senpartie analizas la staton de malmulte konata lingvo.

Hilary Chapman (Britio)

Potenca romano

Materada (1960), Fulvio Tomizza (1935). El la itala trad. Pier Giorgio Soranzo (1933). Pisa: Edistudio, 1983. 159p. 21cm. ISBN 88 7036 017 2. Prezo: 24,00 guldenoj.

Inter 1947 kaj 1955 ducent mil homoj forlasis la istrian duoninsulon en Jugoslavio por enmigri Italion. Kial ili decidis elmigri, tion deziras klarigi Fulvio Tomizza en la romano *Materada*. Ameme kaj iom malgaje li kronikas la monatojn inter Pasko kaj aŭgusto de 1955, kiam sub la premo de sinsekvaj eventoj, Francisko Coslovich decidas kun sia familio lasi sian hejmteron.

La longa kaj pena vojo al tiu decido komenciĝas per avara onklo, kiu intencas fripone senheredigi la nevojn. Por tion malhelpi, "Cisko" entreprenas jen konsultojn kun diversaj publikaj instancoj, jen propraj paŝojn kontraŭ la onklo. Tiajn rakontante, Tomizza klartrajte rekreas la iaman kamparan vivon en Istrio.

Pli kaj pli Cisko konstatas, ke ĉio ŝanĝiĝis. La kroata anstataŭas la italan lingvon. La kolĥozo anstataŭas la privatan bienon. La unua-de-majoj kaj naskiĝtag-festoj de Tito anstataŭas la tradiciajn religiajn festojn. Nerespektindaj oportunuloj kaj eksteruloj ekregas, decidante ne laŭ justeco aŭ merito, sed por personaj gajno kaj venĝado. Eĉ pli fremdige, la vilaĝoj kaj farmbienoj dezertiĝadas pro la elmigroj.

La klopodoj de Cisko nur provokas la ĝismortan malamon kaj de la onklo kaj de la partiestroj. Sur ĉiu tereno minacas fiasko. Restas al ili nur elmigri, iĝante

"homoj, kiuj parolas alian lingvon, kiuj sin nutros kaj vivos laŭ novaj modoj".

Tomizza ne povas pretendi al la merito de senpartieco, sed plurajn meritojn la libro ja havas. Ĝi alloge priskribas homojn, morojn kaj pejzaĝon. Ĝi admirinde agnoskas la kompleksan multflankecon de tiaj fiaskoj: en la decido elmigri ludas faktoroj personaj, ekonomiaj, sociaj, politikaj, eĉ erotikaj. Eksterordinare forte la romano sentigas historion, ĉar la verkisto scias serĉi ĝin en la konkretaj konsekvencoj senteblaj en la unuopaj vivoj de etuloj. Mi forte rekomendas ĉi tiun potencan romanon, kiun en la inteligenta kaj supozeble fidela traduko de Pier Giorgio Soranzo tute ne povas difekti kelkaj negravaj presstrangaĵoj.

James F. Cool (Usono)

Distri kaj eduki

Hungaraj fabeloj, Elek Benedek (1859-1929). El la hungara trad. Mária Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1983 (2a eld.). 70p. Ilus. de Ida Csáky. 20cm. ISBN 963 571 118 2. Prezo: 9,90 gld.

Mi, kiu ekde la infanaĝo aŭdis kaj legis hungarajn fabelojn retrovas ilian ĉarmon en tradukita formo en tiu ĉi simplaspekta kolekto.

La aŭtoro estas unu el la plej famaj hungaraj fabelverkistoj, kaj en liaj rakontoj oni renkontas profundan konon de la popola spirito kaj infana psikologio. Sian fantazion li aplikis por diskonigi kelkajn fabelrolantojn, celante samtempe ne nur distri, sed ankaŭ eduki la infanojn. Fakte, kiel menciiĝas en la mallonga biografio fine de la libreto, plurfoje ripetiĝas la diraĵo "pro bono atendu bonon", kiu forte impresas la legantetojn dum la disvolviĝo de la rakonto. La rolantoj estas kamparaj infanoj, kiuj malkovras la mondon el feinoj, reĝoj, belaj princinoj, bonkoraj kaj malbonaj avinoj, soldatoj, ruzaj arbaraj bestetoj ktp. En ilia ĉeesto ekestas foje normalaj, foje miraklaj, sed ĉiam ravaj okazaĵoj. Ĉiu fabelo estas ilustrita per blanka-nigra desegnaĵo.

La lingvaĵo de la fabeloj ne estas por komencantoj, sed ĝi taŭgas, krom por infanoj, ankaŭ por plenkreskuloj, kiuj kapablas aprezi la freŝecon de la fabeloj, kaj laŭ tiu vojo ekkoni fremdan kulturon.

Eva Formaggio (FR Germanio)

Zamenhofaj tradukoj

De Patronia al Ŝekspir. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, parto 2, volumo 1. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1984. 16 + 439p. Ilus. de M. Fruscieva. 22cm. Prezo: 48,00 gld.

Admirinda estas la diligenta, persista kaj altnivela laboro de Kanzi Itô, kies familia nomo kaŝiĝas en la fino de lia pseŭdonimo Ludovikito. Kiu pensus, kiam en 1973 unuafoje aperis tiu titolo "iam kompletigota...", ke tiu promesplena "iam" fakte iam realiĝus. Kaj aktuale, post nur iom pli ol jardeko, la fino jam estas videbla kaj eĉ skeptikulo komencas kredi, ke la celo estas atingebla.

Kuŝas antaŭ mi la unua volumo de la dua parto, rezervita al la Zamenhofaj tradukoj. Kun preskaŭ pia atento mi enmanigas la libron, foliumas ĝin, konstatas, ke ĝi enhavas kelkajn interesokaptajn ilustraĵojn de M. Fruscieva, rigardas la brile nigran kovrilon kaj sub ĝi la apartan, helbrunan kartonon, kiu, kiam oni ĝin palpas, peras senton kvazaŭ ĝi estus veluro. La papero estas bona, la preso estas klara, sed en kelkaj tekstopartoj ne ĉiam bone legebla. Tiu paradokso ŝuldiĝas al la fakto, ke temas pri depresoj laŭ fotokopioj de la malnovaj unuaj Zamenhofaj presitaĵoj. Ĝuste tio certagrade donas al la tekstoj ilian specialan valoron, ilian aŭtentikecon. Oni povas konfidi, ke ili estas liberaj de malatentaĵoj kaj ŝanĝaĵoj de la postaj eldonistoj. Nur la formatoj estas laŭbezone iom adaptitaj al la libroformato de la nuna eldono.

La volumo enhavas la tradukojn el la fama "unua libro", tiujn el la "dua libro", la longajn seriojn de artikoloj, artikoletoj kaj versaĵoj el *La esperantisto* (1889-1895), el kiuj multaj poste eniris en *Fundamenta krestomatio*, inter ili ankaŭ *La virineto de l' maro*, fine *La feino* el la Ekzercaro kaj *Hamleto* laŭ la unua eldono (Nurenbergo, 1894).

Rekomendi la libron mi ne bezonas. Ĉiu esperantisto laŭ siaj interesoj scios, ĉu ĝi estas malhavebla aŭ ĉu la fruaj Zamenhofaj tradukoj ne koncernas lin aŭ ŝin. Jam anoncitaj estas volumo 2 *De Mickievič al Goethe* (1905-1908), volumo 3 *De Molière al Ŝalom-Alejĥem* (1905-1910) kaj volumo 4 *De Moseo al Andersen* (1910-1914). Al Ludovikito ni deziras, ke tio baldaŭ sukcese efektiviĝu.

Richard Schulz (FR Germanio)

Laste aperis . . .


Alkroĉe al la vivo, Nikolin'. El la franca trad. Emile Van Damme. Namur: la aŭtoro, 1984. 13p. Ilus. Mimeo. 21cm. Blankversa poemaro. Prezo: 6,00 gld.

Dilemoj de la nuntempo – vide el Hungario, red. Sándor Révész. El la hungara trad. diversaj. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 101p. Tabeloj. 21cm. ISBN 963 571 081 X. Ses artikoloj de ses aŭtoroj pri sociaj, ekonomiaj kaj komunikadaj problemoj. Prezo: 12,00 gld.

Elementa Esperanto-kurso-2, Li Weilun. Pekino: Zhishi Chubanshe, 1983. 215p. 19cm. La dua parto de kurso por ĉinlingvanoj: 20 lecionoj laŭ gramatika metodo, kun vortareto kaj traduko de ekzercoj por memlernantoj. Prezo: 9,00 gld.

Esperanto pro děti-2 kaj **Pracovní listy**, Ladislav Prachař. Praha: Český esperantský svaz, 1983. 167+144p. Ilus. Mimeo. 21cm. Dua volumo de lernolibro por ĉeĥlingvaj infanoj, kun ekzercaro. Prezo (kune): 9,60 gld.

Etaj rakontoj, Eduardo Novembro'. El la portugala trad. la aŭtoro. Lisbono: Portugala Esperanto-Asocio, 1984. 129p. 18cm. Dek kvin tradukitaj rakontoj kaj unu originala. Prezo: 5,40 gld.



Eŭlalia, Lorjak (pseŭd.). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 188p. 20cm. ISBN 963 571 126 3. La kvina originala romano de la aŭtoro de *Neologisme*, *Transe*, *Retoj* kaj *Regulus*. Prezo: 21,00 gld.

Gardi la pacon, zorgi pri la bono de la popolo, K.U. Ĉernenko. El la rusa trad. L. Novikova kaj B. Kolker. Moskvo: Novosti, 1984. 29p. 20cm. Oficiala parolado. Prezo: 2,40 gld.

Geologio internacia, Volumo 5. Div. aŭtoroj. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro de UEA, 1984. 172p. (+ 83p. da anoncoj). Ilus. Tabeloj. 21cm. ISBN 963 571 123 9. Dek sep fakaj studoj de diverslandaj aŭtoroj, kun suplementa tabelaro. Prezo: 9,00 gld.

Instruoj de Budho, La, Tokio: Bukkyo Dendo Kyokai, 1983. 310p. 19cm. Bind. ISBN 4 89237 029 0. Prezento de la historio, esencaj instruoj kaj praktikado de la budhismo. Prezo: 18,00 guldenoj.

Internacia geedziĝo. Yokohama: Esperanta Virina Asocio, 1983. 83p. Tabeloj. 26cm. Rezultoj kaj analizoj de enketo pri 66 internaciaj geedziĝoj esperantistaj, kune kun sep artikoloj. Prezo: 16,50 gld.

Johano la Brava (1845), Sándor Petőfi (1823-1849). El la hungara trad. (1923) Kálmán Kaloscay (1891-1976). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984 (4a eld.). 60p. 21cm. ISBN 963 571 138 7. Kvazaŭ "popolfabelo en versoj", la plej populara el la longaj verkoj de Petőfi, la nacia poeto de Hungario, kun postparolo de Vilmos Benczik. Prezo: 12,00 gld.

Life of Gandhi, The (1967), Edmond Privat (1889-1962). El Esperanto trad. Dorothy Threlfall. Hay Street East (Aŭstralio): Artlook Books, 1981. 123p. Ilus. 22cm. ISBN 0 86445 016 8. Anglalingva traduko de la Esperanta *Vivo de Gandhi*, biografio pri homo, kiu iĝis simbolo de la paca rezistado. Prezo: 13,80 gld.

Lingvo internacia en perspektivo-5, Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1984. 46p. 26cm. Seria n-ro 5. Dulingva: Esperanta kaj japana. Tri prelegoj: "Kibernetika teorio kaj empiriaj rezultoj de la lingvo-orientiga instruado de la Internacia Lingvo – kiel bazo de pliposta lernado de etnaj lingvoj" de Helmar Frank, "Aktualaj aspektoj de la lingvoinstruado en multlingva Respubliko Bharato" de Probal Dashgupta kaj "Lingvistika tipologio kaj lingvolernado" de Dan Maxwell. Prezo: 7,50 gld.

Loulan kaj fremdregionano, Yasushi (Yasusi) Inoue (1907). El la japana trad. Masao Miyamoto (1913). Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1984. 12+83p. Ilus. Mapo. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 20. Du historiaj noveloj pri la dezerta zono Taklamakan en Ĉinio, verkitaj de unu el la plej eminentaj modernaj verkistoj de Japanio, kun postparolo de la tradukinto kaj glosaro. Bela grafika prezento. Prezo: 27,00 gld.

Neforgeseblaj kongresoj, La. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 7-bis. Kioto: Eldonejo Ludovikito. 1984. 303p. Ilus. de M. Fruscieva. 22cm. Represoj plejparte el *Lingvo internacia*, *Ruslanda esperantisto* kaj *La revuo* el la jaroj 1905 kaj 1906. Prezo: 48,00 gld.

Ombro sur interna pejzaĝo, Spomenka Štimec (1949). Pisa: Edistudio, 1984. 141p. 22cm. Bind. ISBN 88 7036 019 9. Intima aŭtobiografia romano de konata aktivulino de la Esperanto-movado. Prezo: 24,00 gld.

Pitoreska Pekino, Ĉeng Limin kaj Ŝen Taŭ. El la ĉina trad. Zoŭ Guohiang, Hju Vanfen kaj Lu Binŝeng. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 72p. Ilus. Mapo. 19cm. 17-Es-1827P. Historia kaj turisma priskribo de la vidindaĵoj de Pekino. Kun plenkoloraj fotoj. Prezo: 4,50 gld.

Prezo de la elaĉetado, La, Erwan ar Menga. El la bretona trad. la aŭtoro. Saint-Brieuc: Les Presses Bretonnes, 1982. 111p. 21cm. Rakonto pri la Pasiono de Jesuo kun ampleksaj bibliaj citoj kaj referencoj. Prezo: 15,60 gld.

Satana anĝelo, G.R. Ledon. El la franca kaj portugala trad. S.S. Ledon. San-Paŭlo: la aŭtoro, 1983/4. 205+136p. 21cm. Trilingva: Esperanta, franca kaj portugala. Dudek tri plejparte soci-komentariaj artikoloj en malpeza stilo, kune kun alilingvaj originaloj. Prezo: 12,90 gld.

Secondary School Esperanto, Book 1 (1968), R.H.M. Markarian kaj J.H. Sullivan. Londono: Esperanto-Asocio de Britujo, 1980 (represo de la 2a eld., neindikita). 143p. Ilus. 21cm. Verkita por la lerneja uzado, aplikebla por rektmetoda instruado. Dudek lecionoj, ekzercoj, versoj, kantoj, vortaretoj. Okcent bazaj vortoj. Prezo: 19,50 gld.

Secondary School Esperanto, Book 2 (1971), R.H.M. Markarian kaj J.H. Sullivan. Londono: Esperanto-Asocio de Britujo, 1980 (represo, neindikita). 180p. Ilus. 22cm. Ĉi tiu dua volumo de la kurso por lernejanoj 11-jaraj aŭ iom pli aĝaj aldonas 500 vortojn al la jam instruita provizo. Prezo: 19,50 gld.

Turystyczny słowniczek esperancko-polski, Tomasz Jan Kudrewicz. Bydgoszcz: Centralny Ośrodek Informacji Turystycznej, 1983. 33p. 15cm. Turisma vortareto Esperanta-pola. Prezo: 2,70 gld.

Vortaro de Esperantaj rimoj (1905), Joseph Rhodes (1856-1920). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 23p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 9. Fotorepreso de la unua Esperanta rimvortareto. Prezo: 9,00 gld.

Loke

● **Ĉinio:** La 15an de junio 80 personoj, inter kiuj pluraj konataj sciencistoj, partoprenis en Pekino la fondkunvenon de Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio. La asocio celas disvastigi kaj apliki Esperanton en ĉinaj sciencistaj kaj teknikistaj rondoj kaj progresigi kontaktojn kun tiaj rondoj en eksterlando. La nova scienca asocio estas oficiale sub Ĉina Akademio de Sciencoj. Ĝia prezidanto estas s-ro Meng Guangbin, vicestro de Instituto por Administraj Kadroj. La adreso de la sekretario estas: S-ro Wang Yuchun, P.O. Kesto 2148 (Yi Lou 23), Beijing, Ĉinio.

● **Japanio:** Kun la aŭgusta numero de *La revuo orienta* Japana Esperanto-Instituto dissendis ok-paĝan japanlingvan suplementon pri "Esperanto en Unesko", okaze de la 30-jara datreveno de la rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko favore al Esperanto.

● **Jugoslavio:** La loka stacio Radio Split de la 5a de julio elsendas ĉiuĵaŭde pri kaj en Esperanto. La disaŭdigo daŭras inter kvin kaj dek kvin minutojn kun laŭdire varia enhavo. La adreso de la redakcio estas: Radio Split (EE), Mažuranićevo šetalište b.b., YU-58000 Split, Jugoslavio.

● **Venezuelo:** La 29an de julio okazis en Marakajbo la unua regiona renkontiĝo de okcident-venezuelaj esperantistoj honore al Jesus Enrique Lossada, kiu la unua enkondukis Esperanton en la regionon. La programo de paroladoj, deklamado, teatraĵo kaj kantado allogis ĉirkaŭ cent personojn, kaj je la 4a de aŭgusto aperis raporto en la anglalingva ĵurnalo de Karakaso *The Daily Journal* (12 000 ekz-roj).

● **Zairio:** Esperanto-Instituto de Zairio okazigis sian jarkunvenon en Lukala. Partoprenis po kvin reprezentantoj de kluboj en Kinŝaso, Lufu-Toto, Kuilu-Ngongo, Lukala, Kimpese kaj Luozi, entute 30 personoj. La kunveno, kiun prezidis la direktoro de EIZ, Nduantoni-Bakidila Ngangu, decidis provi organizi nacian kongreson en 1986 kaj krei informan oficejon en Kinŝaso. Oni krome invitas reprezentantojn de eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj veni al Zairio por surloke konstati la disvolviĝadon de la Esperanto-movado kaj alvokas eksterlandajn esperantistojn finance subteni per donacoj al la konto de EIZ ĉe UEA (kodo eizk-l).

Fake

● **Eldonado:** Poligrafia Centro de Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz presas ĉiun duan jaron po tri mil ekzemplerojn de siaj eldonaĵoj. Kvankam la libretoj ne estas grandaj, la Centro diras, ke ĝia laboro solvas la problemon de la bezono de lerniloj en mallonga prestempo. Aldone al instruhelpiloj, la Centro aperigas legolibretojn, por alkutimigi kursanojn al legado de libroj.

● **Esperantologio:** En novembro pasintjare pretiĝis traktaĵo por la magistra grado de la Universitato de Innsbruck, Aŭstrio, kun la titolo *Das romanische Element im Esperanto* (La latinida elemento en Esperanto). Verkis la 159-paĝan laboraĵon s-ino Susanne Krawinkler.

● **Handikapuloj:** Ekde la nuna jaro aperas dumonata gazeto de Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj, kiu nomiĝas *Voĉo de handikapuloj*. Ĝi konsistas el kvar grandformataj paĝoj ofsetitaj kaj ilustritaj. Ĝin redaktas s-inoj Emilija Lapenna kaj Lucija Borčić. La gazeto estas abonebla ĉe *Voĉo*, Školska ul. 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio, kontraŭ 6 usonaj dolaroj.

● Ekde 1979 Asocio de Blinduloj en Bulgario enkasetigas por blinduloj la revuon *Bulgara esperantisto*. En la fino de ĉiu tia numero oni koncize registras materialon el *Esperanto* kaj *Heroldo de Esperanto*. La tekstojn legas la konata bulgara aktorino Belka Beleva. Ĉiu ano de ABB povas ricevi bendojn aŭ kasetojn laŭ abonsistemo.

● **Lingva diskriminacio:** De nun respondecas pri la redaktado de la Unesko-bulteno *Alsed/FIPLV* Fédération internationale des professeurs de langues vivantes (Internacia Federacio de instruistoj de Vivantaj Lingvoj). La bulteno informas pri lingvaj aferoj el la tuta mondo laŭ la principoj de Unesko pri interkompreno kaj toleremo inter la nacioj, sed la redakcio anoncis, ke pro ekonomiaj kialoj la venontaj eldonoj aperos sole en la angla. La anonco finiĝas per la vortoj: "... Unesko kaj FIPLV dividas firman sindevontigon por la naturaj rajtoj de ĉiuj lingvoj,..."!

● **Instruado:** Por prepari ĝisdatigitan eldonon de *Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo*, kiu aperos kiel Esperanto-dokumento de UEA, Germain Pirlot (Kemmelbergstraat 5, bus 3, B-8400 Oostende, Belgio) petas sendojn de aldonoj kaj ŝanĝoj, prefere ĝis la 30a de novembro.

● **Interlingvistiko:** Ĉi-jare aperis franclingva libro *Les fous du langage. Des langues imaginaires et de leurs inventeurs* (La frenezuloj de la lingvo. Pri lingvoj imagitaj kaj iliaj inventintoj) de Marina Yaguello, eldonita de Editions du Seuil, Parizo. Ĝi pritraktas Esperanton kaj aliajn planlingvojn por internacia komunikado kune kun lingvoj pure personaj de histeriuloj ks. kaj klopodas pruvi, ke ĉiujn tiajn lingvojn produktis homoj, kiuj staris ekster la normala vivo.

● **Lernejoj:** La 7an de junio dek unu infanoj el Kersey, Britio, entreprenis sukcesan eksterlandan ekskurson kun sia lernejestro, Ron Bourton, kiu instruas al ili Esperanton. Prizorgis la grupon anoj de la Esperanto-klubo de Bruĝo, Belgio. La malpli ol 12-jaraj infanoj prezentis en la klubejo Esperantajn teatraĵetojn.

● **Naturistoj:** En la aprila numero de la naturista revuo *International Health and Efficiency Monthly*, eldonata en Britio, aperis kvar-paĝa artikolo pri utiligo de Esperanto.

● **Organizaĵoj:** Du malnovaj fakaj asocioj, ambaŭ pli ol 75-jaraj kaj aliĝintaj al UEA, aperigis lastatempe siajn membrostatistikojn pri 1983, kiuj liveras manplenon da interesaj detaloj. La medicinista organizaĵo UMEA havis fine de la pasinta jaro iom pli ol 200 membrojn. Pli ol kvarono de ili estas el Japanio (57 membroj), kiun sekvas Hungario (13), Ĉinio (12), Brazilo (11), FR Germanio, Rumanio kaj Usono (po 9 membroj). La fervojista organizaĵo IFEF havis fine de 1983 entute 2 447 membrojn. Tie preskaŭ triono de la membroj venas el unu lando – FR Germanio (802 membroj), kiun sekvas Francio (230), Hungario (201), Hispanio (182) kaj Aŭstrio (178).



● **Ĉinio: La 15an de julio 74 membroj kaj ses gastoj partoprenis la fondan kunvenon de Esperanto-societo en Hangzhou. En la kunveno prelegis Liu Junfang de la Esperanto-sekcio de Radio Pekino. La societo, kiu nomiĝas Hangzhou-a Esperanto-Ligo, jam organizis du kursojn kun 200 lernantoj.**

● **Informado:** En la antaŭ nelonge aperinta ruslingva volumo *Sovremennye problemy parazitologii* (Nuntempaj problemoj de parazitologio) troviĝas la studo "Pri la problemo de la lingva baro en la scienco" de V. Ščjotkin kaj A. Gončarov. La studo, kiu aperis en Samarkand (Soveta Unio), traktas ankaŭ la eblecojn, ke Esperanto helpu venki la lingvan baron en la internacia scienca komunikado.

● En majo aperis tutpaĝa intervjuo kun Giuseppe Lacertosa pri Esperanto en la itala socikultura gazeto *Interviste oggi*, kiun oni publikigas monate en 45 000 ekzempleroj.

● **Paco:** En la aŭstra vilaĝo St. Ulrich oni antaŭ sep jaroj konstruis pacmonumenton de la tutmonda junularo. Sepdek diverslandaj junularaj organizaĵoj donacis ĉiu brikon. Ĉar neniu Esperanta junulara organizaĵo partoprenis, inĝ. Hans Zeller entreprenis ampleksan petkampanjon. En majo donacis belan ceramikan brikon Aŭstria Esperanto-Junularo.

● **Radio:** La ĉeftemo de la 2a internacia Memorkunveno "Ivan Flanjak", kiu okazos de la 22a ĝis la 24a de marto 1985, estos "Esperanto en radio". Oni bonvenigos verkojn de maksimume dek tajpitaj paĝoj pri tiu temo ĝis la 1-a de marto ĉe la adreso: Kose "Ivan Flanjak", Pf. 27, YU-54000 Osijek, Jugoslavio.

● **Kibernetiko:** Sub la nomo Interkibernetik '85 okazigos sian unuan kongreson Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko de la 27a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1985 en Budapeŝto. La organizanto estas Komputoscienca Societo Johano Neumann, kiu organizis Interkomputo '82, kaj aŭspicias Internacia Kibernetika Asocio (Belgio). Detala anonco aperis en la revuo *Internacia komputado* (n-ro 3/1984). Informas NJSZT-Interkibernetik, Pf. 240, H-1368 Budapest, Hungario.

● **Tradukoj:** Fine de la pasinta jaro en Tokio la eldonejo Kobunsya publikigis dokumentan romanon de Aleksandro Kharkovsky *Monmoku no sizin Erosyenko* (Blinda poeto Eroŝenko). La tekston li verkis ruse kiel specialan version de sia ruslingva romano *Čelovek, uvidevšij mir* (La homo, kiu ekvidis la mondon), kiu en 1978 aperis ĉe la eldonejo Nauka, Moskvo, en 15 000 ekzempleroj. La 5an de marto la aŭtoro lekciis pri sia libro en Novjorko. Li nun esperas daŭrigi siajn studojn pri Eroŝenko en Japanio.

● La gajnintoj de la Franclingva Traduka Konkurso 1983-1984, aranĝita de Unuiĝo Franca por Esperanto, estas por traduko el Esperanto en la francan: unua premio: s-inoj Simone Boniol kaj Louise Marin pro *Katoj* de anonimulo; dua premio: Camille Boumal pro *Kolektanto de ĉielarkoj* de Tibor Sekelj; por traduko el la franca en Esperanton oni ne aljuĝis la unuan premion, sed la duan gajnis Camille Boumal pro *La kokinoj* de Jules Renard. La limdato por la venonta konkurso estas la 31a de marto 1986. La regularo estas havebla de s-ro Hervé Gonin, 9 rue de l'Enclos, F-59151 Arleux, Francio.

● **Universitatoj:** Je la 13a de februaro aperis en la gazeto de la fama usona universitato Harvard, *The Harvard Crimson*, 300-vorta artikolo pri Esperanto, verkita de Roy McCoy.

● **Virina agado:** Okaze de "La jardeko de la virinoj", proklamita de Unesko antaŭ dek jaroj, oni fondis en UEA Komisionon pri Virina Agado. La komisiono, kiu dufoje kunvenis en la Universala Kongreso en Vankuvero, unuanime proponis al la Komitato de UEA, ke ĝi daŭrigu sian agadon. Tion la komitato konsentis. En la venontjara Universala Kongreso en Aŭgsburgo la komisiono aranĝos kurson pri argumentado kaj parolado precipe por virinoj.

UEA-KOTIZOJ POR 1985:

Por mem rekotizi kaj varbi aliajn

Kutime vi trovas ĉiujare ĉi-paĝe la kotiztabelon por la nova jaro. Anstataŭe, ĉi-jare ni sendas al vi kun ĉi tiu revunumero varbilon en kiu aperas ankaŭ la kotiztabelo por 1985. Vi ĝojos rimarki, ke nur en tri landoj – Jugoslavio, Nov-Zelando, Sud-Afriko – la kotizoj altiĝis. Ĉie alie ili restis la samaj kiel en 1984.
Kial ni sendas ankaŭ al vi la varbilon? Nu, ĝi estu memorigo por vi, ke frua pago estas bonvena helpo al UEA. Sed – ĉefe – *ni petas vin fari apartan klopodon varbi por ni novan membron aŭ abonanton*. Krome, vi mem povas kontentigi vian intereson kaj subteni la Asocion per: abono al la novstila *Kontakto*, aliĝo al la Patronoj de TEJO, membriĝo en la aparta mecenata rondo Societo Zamenhof...

Nun, antaŭ la Centjara Jubileo, UEA bezonas vian helpon!

Nekrologoj

W.B.P. BLOMME forpasis komence de aŭgusto en Hago, Nederlando. Ŝi estis membro de UEA dum dek ses jaroj.

DOUGLAS P. BOATMAN (1892-1984), optikisto, mortis antaŭ nelonge en Lyme Regis, Britio. En 1928 li estis la unua prezidanto de Rotaria Esperanto-Amikaro. Lia plej konata Esperanta verko estas la policromano *La nekonata konato* (1932). Li estis membro de UEA ekde 1936.

DIRK DE BOER (1896-1984) mortis la 17an de julio en Rijswijk, Nederlando. Li estis membro de UEA ekde 1950 kaj dum multaj jaroj delegito.

E.C. v.d. LINDE-v.d. MEER forpasis antaŭ nelonge en Groningen, Nederlando. Ŝi estis dumviva membro de UEA.

IRENE SCHILPEROORD el Britio forpasis komence de aŭgusto en Vankuvero, Kanado.

N. v.d. WEIDE forpasis antaŭ nelonge en Leeuwarden, Nederlando. Ŝi estis membro de UEA ekde 1946.

Anoncetoj

Tarifo: *ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.*

30-jara inĝeniero-konstruisto deziras korespondi pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi Esperanto-filatelaĵojn. Respondon garantias s-ro Pavel Vasiljkovskij, Volgskaja 2/10, č 91, SU-410002 Saratov, Soveta Unio.

Al societoj kaj izolaj esperantistoj de la tuta mondo! Ni *urĝe* bezonas monhelpon por akiri propran ejon por nia asocio, ĉar ni estos baldaŭ elloĝigotaj. Asociación Cordobesa de Esperanto, Casilla Correo 456, RA-5000 Córdoba, Argentino.

19-jara irana studento pri fiziko deziras korespondi. S-ro Ahmad Nik-Tab, 27 Alley Mojdeh, Ave. Pasdaran, Ave. Shahid-Rejai, Kermân, Irano.

A.W. Treurniet anoncas sian novan adreson: Rietdekkerweg 87, 3068 GW Rotterdam. Tel.: (010) 21 44 56.

Geanoj de irana Esperanto-grupo deziras korespondi kun la tuta mondo. G. Toomari, Poste restante, General Post Office, Foreign Section, Tehran, Irano.

La vojo al feliĉo de Huberto Rohden, brazila filozofo. Mendu de Spirita Eldona Societo Lorenz, Caixa Postal 3133, Rio de Janeiro, Brazilo. Prezo: 5,60 gld. aŭ 5 rpk.

Se vi havas librojn aŭ gazetojn, kiujn vi ne bezonas, bv. sendi kiel donacon por nia Esperanta biblioteko: Azma, P.O. Box 19415/439, Tehran-Gholhak, Irano.

Vintrajn kursojn en Egiptio per rekta metodo planas gvidi Tadros Megalli. Li serĉas kunlaborantinon. Loĝado kaj vegetara manĝo estos senpagaj. D-ro T. Megalli, Untergarfendorf 18, D-8387 Rossbach, FR Germanio.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Oficiala Informilo

KOTIZPERANTO EN HINDA UNIO

La estraro de UEA nomis por la unua fojo kotizperanton en Hinda Unio. Tio estas la dua paŝo, post la fikso de kotizoj en rupioj, por faciligi al movadanoj en Hinda Unio membriĝi en UEA. La kotizoj por 1985 restas senŝanĝaj (MJ 48 rupioj, MA 120, SA 72, Kto 36). Enspezoj pro tiuj kotizoj restos en rupioj kaj estos uzataj por disvastigi la movadon enlande. La kotizperanto estas FEB, p/a Syamsundar Pal, 35/1 Swami Vivekananda Road, Howrah 711 101, Hinda Unio.

SOCIETO ZAMENHOF 1984

Finnlando: Leo Teräntö; Sirkka Mattlin. Korea Resp.: Ĉung-sik Ĵang. Nederlando: Simon P. Smits. Svedio: Brita Nylén; Sven Sundin. Usono: Armin F. Doneis Sr.; Doris Vallon-Wheeler.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Ruando: Robert Gaillard. Israelo: Matilda Landau.

DONACOJ 1984 (Gld.)
ĝis la 31a de aŭgusto

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: Louise Drèze 100,00. FR Germanio: M. Schaeffer 61,17. Japanio: Ryokusei Kigyo 200,00. Nederlando: E.S. Otto 100,00. Svedio: J. Hammarberg 10,00. Usono: B. Sherwood 157,50. Bankedo en Vankuvero 46,00. Aŭkcio en Vankuvero 925,42. Sumo ĉi-jara 7 685,48.

ĜENERALA KASO: Anonime: Nordlandano 213,77. Nederlando: E.J. Woessink 140,00. Usono: J. Lauterbach 15,50. Svedio: Sven Sundin 20,00. Diversaj malgrandaj 14,86. Sumo ĉi-jara 1 023,06.

FONDAĴO KER DE TEJO: Francio: Eŭropa Konsilio 6 880,58. Sumo ĉi-jara 24 287,47.

JUBILEA JARO: Kolektita en Vankuvero: 2 809,55. Sumo ĉi-jara 2 976,74. (Pluraj kontribuaĵoj kolektitaj dum la 69a UK en Vankuvero ankoraŭ ne eniris ĉi tiun konton. Kiam tio okazos, la tuta sumo de la kolekto estos ĉ. 6 000 gld).

FONDAĴO TEJO: Diversaj malgrandaj: 3,49. Sumo ĉi-jara 175,49.

BUDAPEŜTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: R. Paintner-Trump 1 353,08. Sumo ĉi-jara 3 607,26

POR RENOVIGO DE LA DOMO: Belgio: Germaine Wolff 10 000,00; Louise Drèze 50,00. Anonima donaco 3 000,00. Sumo ĉi-jara 13 050,00.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (minimume $25): Sud-Afriko: Sud-Afrika Esperanto-Asocio (SAEA). Usono: Armin F. Doneis Sr.. AMIKOJ (minimume $10): Svislando: Werner Laederach. Usono: Ruth Kaufman.

PATRONOJ DE TEJO 1984

Britio: Tom C. Fraser. Francio: Philippe Dautreville. Irlando: Christopher Fettes. Italio: Norberto Saletti. Jugoslavio: Neven Kovačić. Nederlando: B. Kappert. Ruando: Robert Gaillard.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

ALVOKO AL INTERESITOJ: Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, legado-projekton, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH17 7LN;** aŭ, se ekster Eŭropo, al **P.O. Box 373, Boronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

internacia magazino sendependa

MONATO

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la

Koresponda Servo Mondskala de UEA

Adreso: KSM, p/a s-ro R. Llorens,
121 bis, Bd. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

INTERNACIA KOMPUTADO


MIKROKOMPUTILOJ
+ ***VARIAJ TEMOJ***
+ ***MODESTA PREZO***
= ***INTERNACIA KOMPUTADO***

Eleganta revuo, interesa legaĵo ***ne nur por komputistoj!*** *Kvaronjare 64 paĝoj! Abonu kaj donacu jarabonon al verdigenduloj kaj institucioj! Tutjare aboneblas en trideko da landoj sur ĉiuj kontinentoj (detale vidu la kovrilpaĝon de la Jarlibro). Ĉe UEA 24 ned. guldenoj.*



Language Problems & Language Planning

LPLP estas la nura revuo dediĉita al progresigo de la interkompreniĝo kaj solvo de la lingvorilataj problemoj pere de novevoluanta disciplino de la lingvo-planado. La revuo publikigas artikolojn, tiel teoriajn kiel praktikajn, kiuj konsideras politikajn kaj sociologiajn aspektojn de lingvoj en diversaj geografiaj regionoj. La artikoloj povas aperi en iu ajn lingvo, kun resumo en Esperanto. **LPLP** aperas sub la aŭspicioj de Centro de Esploroj kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (instanco de UEA).
La revuon eldonas trifoje jare: University of Texas Press, P.O.Box 7819, Austin, Texas 78713, Usono. La abontarifoj estas: US$27 (por institucioj) aŭ US$15 (por individuaj abonantoj) jare. **LPLP estas abonebla ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA.**



UEA anoncas la (re)aperon de

ESPERANTA ANTOLOGIO; POEMOJ 1887-1981

Universala Esperanto-Asocio eldonis ĉi tiun reprezentan poezian volumegon, sub la redakto de William Auld. Temas pri la dua eldono – abunde reviziita kaj kompletigita – de la iama "Esperanta antologio" (1958). En ĉi tiu preskaŭ 900-paĝa volumo – unu el la plej imponaj libroj en Esperanto – aperas 850 poemoj de 163 poetoj. Auld provizis la verkon per ampleksa postparolo pri la Esperanta poezia arto kaj per 36 paĝoj da biografiaj notoj.

Esperanta antologio; Poemoj 1887-1981. Red. William Auld (1924). Rotterdam: UEA, 1984 (2a eld.). 12 + 871p. 22cm. Bindita. Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*, n-ro 1. ISBN 92 9017 030 1. Prezo: 60,00 guldenoj.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!



Antikvaj turoj kaj pordegoj, imponaj muroj: jen en norda Bavario (FR Germanio) la fabela urbo

Kronach

kun siaj pitoreskaj stratoj kaj beletaj domoj, kronita de mezepoka fortikaĵo, meze en arbaroriĉa montoregiono, malfore de famkonataj kaj nepre vizitindaj lokoj.


Ĉu vi notis jam, ke okazos ĉi tie post la 70-a UK internacia feriosemajno de la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto 1985 kun vere alloga programo? Petu informojn de

Fremdverkehrsamt
Postfach 510
D-8640 Kronach, FR Germanio

Ĉu vi ŝatus profesie labori por Esperanto?

UEA serĉas novan oficist(in)on por plenumi unuavice kongresajn kaj turismajn laborojn. Bezonataj kvalitoj estas iniciatemo, administra kaj komerca talento, kapablo bone rilati kun kunlaborantoj kaj reprezenti la Asocion ĉe eksteraj instancoj, laŭeble sperto pri la vojaĝindustrio, flua scipovo de Esperanto kaj eventuale de aliaj lingvoj.

Salajro estos interkonsentita. Posteniĝo eblas frue en 1985. Sinproponoj estu senditaj al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



NOVA INTERNACIA REVUO POR DISTRO KAJ AMUZO

OVO-
-ENHAVO:
bildstrioj, humuraĵoj,
sciencfikcio, (ne)kutimaj
intervjuoj, internacia helpo,
favoraj vojaĝeblecoj, konkursoj,
ŝercoj kaj satiroj pri la E-movado,
distraj interesaĵoj, detektivaj romanoj,
naturfenomenoj kaj . . . pluraj surprizoj.

OVO—legaĵoj estas ĉiam aktualaj kaj konvenaj por ĉiu aĝo kaj ĉiu lingvokona nivelo de Esperanto. OVO precipe konvenas al KOMENCANTOJ.

OVO aperos ĈIUN 3-an SEMAJNON ekde septembro 1984. JARABONO estas 35 nederlandaj guldenoj (aŭ egalvaloro). RABATO: pagantoj ĝis la fino de aŭgusto 1984 pagas nur 29 nederlandajn guldenojn.
Je 10 abonoj unu senpaga !
Viajn OVO-numerojn vi povas mendi kaj aboni ĉe INTERNACIA KULTURA SERVO, 41000 Zagreb, Amruševa 5/1, Jugoslavio.
Bonvolu peti provnumeron !

(041) 424-660

UNIVERZITETSKA * BIBLIOTEKA

ZM

Lernometodo de Esperanto kreita de zagrebaj esperantistoj baziĝas je logika strukturo de Esperanto mem, kaj je la rezultoj de vortofteca esplorado de parolata Esperanto. La antaŭaj eldonoj de la lernolibro laŭ la ZM jam estas adaptitaj al 15 lingvoj. Kromaj help- kaj ekzercomaterialoj, akopanantaj la lernolibron, ebligas tre sukcesan memlernadon, aparte en grupoj kaj kursoj sen tradicia, preleg-predika, funkcio de instruisto. La metodo aplikeblas ankaŭ por rapidegaj, t.n. semajnfinaj kursoj. La nova (6-a) eldono de la lernolibro ebligas ankaŭ la INTERNACIAJN KURSOJN, kun partoprenantoj el diverslingvaj landoj, ĉar ĝi estas eldonita, en tute identa formo, en la GERMANA, ITALA, HUNGARA, KROATSERBA, FRANCA kaj ANGLA lingvoj.

la zagreba metodo

Kompleto por la baza (A) kurso de Esperanto laŭ la ZM konsistas el:

1 — LERNOLIBRO ...6 gld
2 — KASETO kun tekstoj kaj kantoj el la lernolibro .....10 gld
3 — ,,KIU ESTAS JOZEFO?'' - ekzercobildstrio .....3 gld
4 — LA SENTIMULO - romano en facila Esperanto .....9 gld
5 — Instrukcioj por instruistoj .....1,5 gld

Rabatoj:
— La kompleto + 1-jara abono al ,,OVO'' ...50 gld.
— Por mendoj de minimume 25 lernolibroj kaj 25 bildstrioj oni ricevas senpage 1 kompleton + ,,Ovo''-jarabonon
— Por minimuma mendo de 10 ekzempleroj de lernolibro aŭ bildstrio aŭ ,,La Sentimulo'' oni ricevas 50% rabaton.

Mendoj ĉe : Internacia Kultura Servo, YU-41000 Zagreb, Amruševa 5/1